

Usona **Esperantisto**

Bulteno de Esperanto-USA - N^o 2024:1



Esperanto-USA salutas vin

President's Report for Bulletin 2024:1

p.3

de la prezidanto • Brandon SOWERS

Brandon Sowers talks about the many exciting developments at E-USA since the start of his presidency in 2023!

Salutojn de la nova redakcio

p.4

Ekkonu la novajn redaktorojn de *Usona Esperantisto!*

Anoncoj

p.5

2023 Membership Survey Results; Proposed Bylaws Update; Updates from the Central Office; Virtuala Antaŭkongreso (ViA); Landa Kongreso 2024; Donate to the Esperanto in the USA fund (Matched by ESF); Printempa Esperanto-Renkontiĝo (PER); Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK); Ekzerc-retejo por KER-ekzamenoj (de UEA); London Esperanto Club (LEK) Online Courses; Kanado invitas vin al KVAK

Jan-Feb Board Activity

p.11

de la estraro

Summary of [January](#) and [February](#) board meeting minutes.

Jan-Feb Expense Report

p.12

de la centra oficejo • Vilĉjo HARRIS

Expense report from the CO for January and February.

Saluton de ukrainaj rifuĝintoj

p.14

vojaĝe tra la mondo • Raja BOJKO, Sergeo BOJKO

Gesinjoroj BOJKO salutas sian novan hejmon kaj rakontas pri vojaĝoj de Ukrainujo ĝis Usono!

David kaj Goljat

p.15

beletre • Timothy BORONCZYK

"Mi bedaŭras. Mi estas granda lingvomodelo, kaj mi ne povas verki priskribon pri tiu artikolo."

Krucvortenigmo: Skota skadrono

p.16

enigmoj • Kartero WILLIAMS

Nova enigmo por komenci la jaron!

Esperanto in Numismatics

p.18

informado • Roberto MENCHACA

This paper examines the imprint of Esperanto and that of its prominent figures on numismatics worldwide. It also reviews the initiatives undertaken to date in order to create an international currency associated to this language.

La vivo de Peĉjo

p.20

ŝercoj • Timothy BORONCZYK

La tridek-unua en serio de Timothy BORONCZYK.

Informoj por kongresontoj

p.22

Necesaj informoj por vojaĝontoj al la ĉi-jara *Universala Kongreso* en Aruŝo, Tanzanio.

Laste aperigitaj de Vinilkosmo

p.23

muziko • Alena ADLER

Novaj eldonoj de *La Mondanoj*, Jonny M, ĴeLe kaj TIM.

About "el" and "de"

p.24

language corner • Lee MILLER

English speakers sometimes experience challenges deciding when to use "el" and "de", because both can often be translated with the word "of".

Sceno 1, TAKE 10 en Fortalezo

p.25

kongresaj raportoj • Alekso MILLER

Spontanea filmado ĉe tutamerika kongreso!

Stuff You Should Know

p.26

media hits • Rama MARVIN

Januara epizodo de la plej fama podkasto aldonis Esperanton inter la *aferoj konindaj*.

X is for Xenomaniacs (and Esperantists)

p.26

libroj • Ellen EDDY

One can discover Esperanto in the most unexpected of places!

Batalo por Tero aŭ vetkuro al la steloj

p.27

ludoj • Joshua HOLZER

Kiel povas "la lingvo de paco" fariĝi la lingvo de civilizacio?

A Letter from Alabama

p.28

Three aspiring Esperantists from Alabama are seeking correspondence the old-fashioned way!

Mikronoveloj

p.29

Novaj centvortajoj por komenci 2024!

President's Report for Bulletin 2024:1

de la prezidanto • Brandon SOWERS

Hello! I'm really excited to share updates in this, the first issue of *Usona Esperantisto* for 2024, the first to be edited by our new editorial team of Alena Adler and Logan Hall, and the first to be printed by our new printer.

You may in fact be holding *Usona Esperantisto* in your hands for the first time ever as you read this. We are very proud of this issue and of the work that our editors have done, and proud to send it to every single member, as required by our bylaws. We heard a lot of feedback from members at the *Landa Kongreso* in Raleigh that they would like to receive a printed version of the newsletter. Not everyone knew that they could, or how to request this. In some cases, readers unexpectedly received the printed version, and found that they read many more of the articles than when they only viewed the bulletin online. We listened to this feedback and took it on board.

We're fortunate to have found and partnered with Nero Ink, a worker-owned print shop in Chicago that looks for every possible way to make their process more ecologically friendly, such as low heat printing and closed loop recycling. Nero understands the alignment between their values and ours, and they are working closely with us to make this transition successful.

You may even be surprised to have received this issue, if your membership expired sometime in the last few years. Consider it a gift from us. We are confident that this issue is a good representation of the many exciting activities that are happening in and around Esperanto-USA, and invite you to see for yourself. If you like what you see, and want to support it and to get involved, we would love to have you rejoin! You should see a QR code on the cover that will help you do that.

Whether you're a current member or have lapsed sometime in the past few years, I'd like to let you know more about the many things that are happening.

As I mentioned above, this is the first issue edited by the dynamic duo of Logan and Alena. They have taken the baton from Hoss Firooznia, who did an excellent job as editor for many years, and they have hit the ground running. I'm very happy with what I've seen so far, and I trust you will be too!

This year will also see a big transition in our Central Office. Amanda Higley Schmidt began in her role as Transitional Director of the Central Office in January, and is currently working on all of the many items which will need to be transitioned to allow Bill Harris to retire later this year, after nearly 20 years of service to the organization. I'm confident that Amanda will bring a lot to the role!

We've got plenty of other things going on. I'll start with a quick review of the second half of 2023, and then discuss what's on our radar for 2024.

I'll keep the 2023 review very brief. We had two very positive signs early on: one was the large number of Americans who went to Torino for the *Universala Kongreso*; the other was a sizable bequest from Ron and Ann Swenson which has put us on a much stronger financial footing. You can read articles about both of those in the last issue of *UE*. The Board of Esperanto-USA also supported local groups to participate in the *Paralela Universo*, with good results; and we gave support for several Americans to go to the *Tut-Amerika Kongreso de Esperanto* in Brazil, where we were the largest group from outside of Brazil! There is an issue about *TAKE* in this issue as well as the previous one.

For 2024, things are looking bright! Our goal for the *Landa Kongreso* is 100 participants, which would be the biggest in decades; by the end of the early bird period, we had 75, which is a great sign. (And if you're not one of those 75, it's not too late to sign up – look for the announcement in this issue!) We're excited to hold it at Cal State Dominguez Hills – which holds an excellent Esperanto archive – and to host the annual meetings of the *Kanada Esperanto-Asocio* and the *Ligo de Samseksemaj Geesperantistoj*.

For the first time in years, there is an active group of young Esperantists in the US who are coordinating with each other. We have written recommendations for several of them to support applications for scholarships to attend the *Internacia Junulara Kongreso* in Lithuania, and we're also looking forward to seeing them at *NASK* and at our *Kongreso*.

We're continuing to expand our educational engagements. This includes ongoing support for the *Nord-Amerika Somera Kursaro*, the establishment of the first-ever "Mini-NASK" crash course during our *Kongreso*, discussions with Cal State Dominguez Hills about possibilities for ongoing collaboration, working closer with the Esperantic Studies Foundation, and initial explorations of the possibility of establishing a scholarship program. I am particularly excited about a joint project with the *Brazila Esperanto-Ligo* to support a school in Brazil which teaches Esperanto (among other subjects) to young children whose parents are in prison. A visit to this school was one of the highlights of *TAKE*.

In addition to the strong relationship that we built with the Brazilian movement during *TAKE*, we are expanding our connections to *samideanoj* in North and South America. With many Canadians registered for our upcoming *Kongreso*, I'm sure that we'll find a lot of ways to work together. (Don't miss the upcoming *Kanada Virtuala Kongreso* on April 6, which they've invited us to participate in!) We have also appointed Jonathan Thomas as our representative on UEA's *Amerika Komisiono*. Jonathan recently participated in a meeting with representatives from across the Americas. We are also increasing our involvement with UEA, and our support for the office of UEA at the United Nations in New York.

As you can see in this short update, and will see in more detail in the pages of this issue, there is a lot going on! Many hands make light work - now is the perfect time to ensure your dues are up to date, to set up auto-renewal, to rejoin if your membership has lapsed, and perhaps even to consider an additional donation, such as through ESF's matching fund program. Now is also a great time to get involved in one of our volunteer committees, which are always looking for new members and new energy.

Your support will help us make sure that the first issue of 2025 is even more full of exciting updates!

Samideane via,

Brandon Sowers



Brandon SOWERS estas la prezidanto de la estraro de Esperanto-USA. Li esperantistiĝis en 2003 kaj aktivis en pluraj urboj kaj landoj. Li estas parto de la teamo de Usono Persone.
<youtube.com/@usonepersone>

<brandon.sowers@esperanto-usa.org>

Salutojn de la nova redakcio

Hoss FIROOZNA, servinte 16 jarojn kiel la redaktoro de *Usona Esperantisto*, ĝin transdonis en Januaro al Alena ADLER kaj Logan HALL, kiuj prilaboris ĉi tiun numeron. Alena kaj Loĉjo salutas la legantaron!

La nova redakcio deziras esprimi sian plenkoran dankegon al Hoss pro la sperta gvido, kiun li malavare kundividis dum multaj trejnkursidoj. Dum la multaj jaroj en kiuj li servis kiel redaktisto, li kreis multajn brilajn kaj nemalhaveblajn ilojn malantaŭ la kulisoj. Atendu artikolon pri la transiro de la redakcio en estonta numero de *Usona Esperantisto*.

Saluton al la legantoj de *Usona Esperantisto*! Mi estas Alena ADLER, esperantisto de tri jardekoj, kaj foja Esperanto-instruisto (ĉe NASK kaj enrete). De preskaŭ kvin jaroj, mi tujelsendas esperantlingve ĉiun semajnon per mia plurlingva kanalo, AlenaFenomena ĉe Twitch¹ kaj YouTube.² Unu celo de mia plurlingvismo tie estas flegi komunumon ĉe Twitch kaj Discord. Per tio mi diskonigas bonan famon pri esperantaj komunumo kaj kulturo al alilingvanoj. La komunumo daŭre provizas esperantlingvan enhavon por lernantoj kaj lernintoj, kaj engaĝas ilin kun nia kulturo. Dua celo, kiun mi klopodas efektiviĝi tie, estas kuraĝigi aliulojn kundividi siajn lertojn kun Esperantujo per diversaj medioj.

Aliaj esperantaj faroj miaj inkluzivas tradukadon, muzikumadon, aktoradon (teatran, filman, kaj voĉan) kaj reĝisoradon. Mi instaligis kiel nova membro de la teatra fako de la Belarta Konkurso, komisiono de UEA. Estas granda plezuro aniĝi al la redakcio de *Usona Esperantisto*! Mi antaŭĝojas servi la membrojn de Esperanto-USA.

1. <twitch.tv/alenafenomena>

2. <youtube.com/@alenafenomena>


Saluton! Mi estas Logan HALL, aŭ simple "Loĉjo" — 25-jarulo el Kansas-Urbo, Misurio, kiu esperantistiĝis en 2020 dum la pandemio. Ĝis tiam mi konis neniun planlingvon, kaj la ideo tuj absorbis min! En kvar jaroj, mi iris al du Esperanto-kongresoj, trapasis la KER-ekzamenon (C1), kaj fariĝis administranto de la plej granda Esperanto-komunumo ĉe la retplatformo Discord. En 2023 mi aniĝis al du komitatoj de Esperanto-USA, kaj ankaŭ lanĉis esperantan novaĵ-elsendon, Resumo Monata!¹ Per ĝi mi strebas disvolvi modernan, modelan Esperanton pri aktualaĵoj, kaj mi tre dankas E-USA pro la oportuno porti mian strebon al *Usona Esperantisto*!

En la persona vivo, mi estas programisto, videoludanto, amatora voĉaktoro, kaj fojfoje mi kreas videaĵojn por Jutubo.² Profesie mi estas analizisto pri informadik-sekureco (*cybersecurity analyst*) de preskaŭ ok jaroj. Kiam oni petas unu interesan fakton pri mi, mi respondas aŭ pri Esperanto, aŭ pri tajpado — mi povas tajpi po 150 vortojn minute!

Per ĉi tiu bulteno mi ĝojas ekkoni vin, aŭtorojn kaj legantojn, kaj mi feliĉe atendas viajn korespondojn!

1. <loganhall.net/eo/resumo-monata>

2. <youtube.com/@CodeWeaverCW>



2023 Membership Survey Results

Tutkoran Dankon to all members who took the time to participate in the 2023 Membership Survey. Your contribution will play an important role in shaping the future strategies and initiatives of Esperanto-USA.

Here's a summary of the survey's findings:

1. **Membership Composition:** Our membership is composed predominantly of long-term (more than 10 years, 40%) and new members (1-3 years, 42%); mid-range membership (4-10 years, 19%) suggests a challenge in long-term engagement and retention.
2. **Esperanto Proficiency:** Language proficiency varies across our membership: beginner (19%), intermediate (43%), and advanced (39%). The level of intermediate proficiency highlights a notable plateau in progression and suggests more targeted educational material is needed to facilitate advancement in Esperanto.
3. **International Usage:** A significant majority of our members (85%) has used Esperanto for international communication, demonstrating the language's practical benefits.
4. **Interests and Activities:** Members express a keen interest in cultural activities (e.g., literature, music, film, travel), suggesting the need for increased cultural events and special interest groups. These interests should also be considered when soliciting content for *Usona Esperantisto*.
5. **Landa Kongreso Participation:** Only 47% of members have attended a Landa Kongreso. Because congress attendance correlates with keeping members more engaged in other aspects of the organization, there should be an effort to boost participation.
6. **Usona Esperantisto Reception:** The newsletter enjoys positive reception, with an average rating of 4 out of 5. Members desire more frequent publication and more content diversity. Additionally, there is some confusion among readers pertaining to distribution formats that should be clarified.

7. **Organizational Transparency:** Inclusion of the Board Meeting minutes in *Usona Esperantisto* is well-received. About half of members (54%) report they read them, indicating that this approach is successful in providing visibility into the organization and promoting transparency.
8. **Retbutiko Feedback:** Members appreciate having an online store available, but a clear need exists for modernization and a more diverse product offering. Addressing these concerns could improve the retbutiko's usefulness and its potential as a revenue generator.
9. **Member Desires:** Members expressed a strong desire for more diverse resources and activities, including increased support for local events, enhanced educational materials with a focus on improved online courses, and stronger Esperanto promotion efforts.

Once again, thank you for being an integral part of this process. The 2023 survey shows the membership is committed and engaged! Should you have any questions or further suggestions, don't hesitate to contact us. Your feedback is always welcome.

Proposed Bylaws Update

de la estraro

Over the past few months, the Board has been working on a proposed update to the bylaws, which will simplify it and bring it into line with best practices and recommendations for non-profits. The Board has approved a draft to share with the membership and solicit feedback prior to finalizing for the ballot. There will be a presentation of it during the upcoming *Virtuala Antaŭkongreso (ViA)* on April 20. You can read the [proposed revision here](mailto:secretary@esperanto-usa.org):

<bulveno.esperanto-usa.org/a/2024/01/bylaws/>

If you would like to send any feedback prior to ViA, you can email secretary@esperanto-usa.org.

Updates from the Central Office

New Address

Please note, over the next few months our Central Office will be moving to Sacramento, California. You can already begin to use our updated address, listed below.

**Esperanto-USA, 2014 Capitol Ave,
Sacramento, CA 95811, United States**

Five for Five Books

A new offer is live in the E-USA [retbutiko!](https://retbutiko.com) <tinyurl.com/EUSA-545> For five dollars, receive a “surprise package” of five randomly-selected books, while supplies last. These may include fiction, nonfiction, and poetry books.

Board Candidate Statements

Keep an eye out in *Usona Esperantisto* N^o 2024:2 for statements by this year’s candidates for the Board:

- **Treasurer:**
 - Mateo Brooks
- **Directors:**
 - Ŝneoro Agronin
 - Peggy Dolter
 - Maja Gardener

If you’d like the chance to hear the candidates speak and ask them questions ahead of this year’s *Landa Kongreso*, sign up for the *Virtuala Antaŭkongreso (ViA)* and come to the candidates’ session at 12:30 Eastern Time!



ViA Virtuala Antaŭkongreso
20-a de Aprilo | 10h00–20h30 laŭ novjorka tempo

Kio okazos/kion mi faru dum ViA

- Prezentoj de ESF kaj NASK
- Prezentos sin la estraraj kandidatoj
- Raportos la Centra Oficejo
- Ekkonu la komitatojn de Esperanto-USA
- Renkontu la novan bulteno-redakcion
- Vidu proponitajn ŝanĝojn al la statuto
- Informiĝu pri la venonta Landa Kongreso

Aliĝu kaj partoprenu!

ViA - Virtuala Antaŭkongreso

Plaĉas al ni anonci *ViA* – nian unuan **Virtualan Antaŭkongreson!** Ĉi tiu reta evento donos al ĉiuj interesigantoj la eblon salti en Esperantuĵon antaŭ la reveno de la *Landa Kongreso* en Losanĝeleso! Pretiĝu por renkonti la estrarajn kandidatojn, koni la komitatojn de E-USA, kaj pli!

ViA okazos **sabaton, la 20-an de Aprilo**, de 10h00 ĝis 20h30 laŭ novjorka tempo. La evento estos registrita, por ke vi ne maltrafu la programerojn, kiujn vi ne povos ĉeesti.

Ni invitas vin [rigardi la tagordon kaj aliĝi!](https://tinyurl.com/ViA-EUSA-2024) <tinyurl.com/ViA-EUSA-2024> Aliĝintoj ricevos ligilon (verŝajne *Zoom*) antaŭ la evento. Bonvole skribu iujn ajn demandojn al logan.hall@esperanto-usa.org.

Landa Kongreso 2024



La usona *Landa Kongreso* de 2024 okazos de la 12-a ĝis la 15-a de Julio, ĉe *CSU Dominguez Hills*, 15 minutojn de la internacia flughaveno *Los Angeles* (LAX), 15 minutojn de la plaĝo. Ni prilaboras amuzan kaj energian programon kun eroj kiel plaĝfesto, prelegoj pri la historio de Esperanto en Losanĝeleso, komuna muzikfarado, kaj pli. Ni planas antaŭ- kaj post-kongresajn ekskursojn al pluraj el la amuzaj lokoj, kiujn suda Kalifornio disponigas.

Ni tre ĝojas labori la unuan fojon kun la teamo de NASK por plani kurseton dum la Kongreso por novaj kaj meznivelaj esperantistoj.

Vi povos nuligi vian aliĝon kontraŭ plena ristorno ĝis la 30-a de Aprilo, 2024.

Stipendioj estas haveblaj por la kostoj de loĝado kaj manĝoj. Se vi bezonos aldonan helpon, bonvole skribu al landa.kongreso@esperanto-usa.org.

Se vi volas aldoni donacon, tio kontribuos al stipendioj por aliaj partoprenantoj.

Notu: Neplenkreskulojn devos akompani plenkreskuloj. Bonvole kontaktu nin por aranĝi aliĝon de neplenkreskulo.



<tinyurl.com/EUSA-LK-2024>
Aliĝu tuji!

Donate to the *Esperanto in the USA* fund (Matched by ESF)

E-USA is delighted to announce that the matching donations program through the Esperantic Studies Foundation (ESF) has been renewed for 2024. ESF will match a total of \$5000 in donations earmarked for E-USA. When you donate to E-USA through ESF, your donation will be matched dollar for dollar. The matching funds are intended to be used to provide direct benefit to E-USA members and in the past have been crucial to the success of the *Usona Bona Film-Festivalo*. Please donate to help us continue to fund Esperanto activities and programs in the United States.



Accommodation: Mission House (Shared rooms with 2-6 people in each room. Single rooms are available upon request and if available.)

Program Leader: Bill Maxey

All-Inclusive Price: Registration includes the program, two nights lodging and all meals.

Cost: \$275 for E-USA Members and \$300 for non-E-USA members. Financial assistance is available for students, retirees and special situations.

Payment Options:

- (Preferred) By credit card via [Zeffy](https://tinyurl.com/zeffy-per2024).
<<https://tinyurl.com/zeffy-per2024>>
(Zeffy does not charge credit card processing fees!)
- By check made to Charles Mays and sent to 638 Greenwood Circle, Cary, NC 27511. Please send an email to charles.o.mays@gmail.com if you pay by check.
- By transfer via PayPal to paigedmiles@yahoo.com.

Please register online to give us information on your preferences, needs and expectations!

<<https://tinyurl.com/register-per2024>>

COVID Policy: We ask that you take a COVID test a day or two before 5 April. If you test positive for COVID we will refund your registration fees. Masks are recommended during the event. If VCCC has a COVID policy, we will follow their recommendations. We will have masks and COVID tests available during the event.

More information: Chuck Mays, Tel: 919-744-8003, charles.o.mays@gmail.com.

Printempa Esperanto-Renkontiĝo

La ĉiujara PER prezentas maloftan okazon por esperantistoj pasigi du tagojn en intima Esperanto-rondo.

Vendredo la 5a ĝis
Dimanĉo la 7a de Aprilo

Aliĝu nun!

Printempa Esperanto-Renkontiĝo, 5-7 April 2024

PER (Printempa Esperanto-Renkontiĝo) is the annual Esperanto event for the Middle Atlantic Region of Esperanto-USA.

Dates: Starts with dinner on Friday, 5 April and ends after lunch on Sunday, 7 April.

Location: Valle Crucis Conference Center, 146 Skiles Way, Banner Elk, NC 28604 (Unfortunately, virtual participation will not be possible.)





NASK

Nord-Amerika Somera Kursaro 2024

La Nord-Amerika Somera Kursaro <nask.esperanto-usa.org> revenos al William Peace University, en Raleigh, Norda Karolino por ĉeestaj kursoj de la 1-a ĝis la 5-a de Julio. (Lernantoj alvenos la 30-an de Junio kaj foriros la 6-an de Julio.)



La NASK-a kursaro konsistas en cellingva etoso. Sed se vi faris ankoraŭ nur baznivelan studon de Esperanto, ne malesperu! Aliĝu al la Meznivela kurso kaj ricevu retan, pretigan kurson senkotize.

Kotizoj

Kun manĝoj kaj ĉambro ĉe la universitato:

- Dividita ĉambro: 650 USD
- Privata ĉambro: 900 USD

Stipendioj

Stipendia helpo haveblas. Sendu demandojn al la administranto. <tinyurl.com/nask2024-admin>

Registriĝo

Plenigu la jenan formularon (Zeffy). <tinyurl.com/nask2024>

Kursoj

Meznivela kurso (B2):

“Ni lernu pli pri Esperanto... kaj ni amuziĝu!”

Rafa NOGUERAS

Dum ĉi tiu kurso Rafa helpos vin pligrandigi viajn sciojn pri Esperanto kaj ties kulturo per instruado de proverboj, oftaj esprimoj kaj utilaj gramatikaĵoj. Ni legos, verkos, okazigos diskutojn en etaj grupoj, kaj faros amuzajn aktivajojn por kune uzi la lingvon. La kurso ĉefe celas homojn kiuj jam kapablas sufiĉe bone kompreni la lingvon, sed volas pli da okazoj por uzi ĝin.



Supera kurso (C1): “Kunpromenu sur la tereno de altnivelaj vortprovizo kaj gramatiko”

Birke DOCKHORN

En la kurso por la supera nivelo vi povos vastigi vian ĝeneralan kaj specialan vortprovizojn. Kaj vi povos plibonigi vian kapablon paroli pri diversaj interesaj temoj de la nivelo C1: vivolonga lernado, sano, familia vivo kaj teĥnika progreso. Mi esperas je vigla interŝanĝo de informoj kaj subtenos vin esprimi viajn pensojn. Pere de aktivigaj ekzercoj mi konatigos vin kun vortoj kaj vortfamilioj pri la respektiva temo, promenos kun vi sur vortkampoj kaj helpos al vi difini kaj detale priskribi aferojn. Laŭbezone mi traktos necesan gramatikon. Akcentata estos la parolkapablo, sed kompreneble la aliaj lingvaj kapabloj kiel aŭdokompreno, legado kaj skribado ne estos neglektataj. Estu bonvenaj!



Pretiga kurso

Vinĉjo ALLISON

La Nord-Amerika Somera Kursaro proponas **pretigan kurson** por ĝis 20 lernantoj, ĉiun lundon de la 15-a de Aprilo ĝis la 3-a de Junio, de 20h30 – 21h30 laŭ la usona orienta horzono (UTC-4). **Vince (Vinĉjo) ALLISON**, kiu instruis porkomencantajn kursojn por la Londona Esperanto-klubo, helpos vin plifirmigi tion, kion vi jam lernis pri Esperanto, kaj pretiĝi por ĉeestanta kurso en Julio.

La kotizo por la pretiga kurso estas 90 USD. Tiuj, kiuj aliĝas samtempe al la ĉeesta kurso, ne devos pagi la retkursan kotizon. Por informiĝi pri stipendioj, tiuj kun financa bezono kontaktu la administranton. Registriĝu por la pretiga kurso per la jena formularo. <tinyurl.com/nask2024>





Ekzerc-retejo por KER-ekzamenoj

Edukado.net kun subteno de UEA decidis plukonstrui ekzamenretejon, per kiu eblos ne nur ĝui diversajn interagajn ekzercojn, sed ankaŭ taksati sin por la unulingvaj Esperanto-ekzamenoj de UEA laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER-ekzamenoj). Gvidas la laborojn Katalin Kováts, direktorino de la KER-Ekzamena Centro (KER-EC) de UEA kaj redaktoro de *Edukado.net*. Por la okazigo de provekzamenoj en 2024 la projekto bezonos plian investon de 2000 eŭroj (€). UEA pretas donaci sumon ĝis 1000 €, aldonante 1 € post ĉiu donacita 1 €. Vi povas subteni tiun programon per donaco al la UEA-konto [Eduko](mailto:uea.org/alighoj/donacoj/eduko) <uea.org/alighoj/donacoj/eduko>.

Detaloj pri la projekto

La ekzamenpaĝo <interaga.edukado.net> por retaj ekzamenoj kaj arĥivitaj ekzamentestoj jam funkcias kaj estis elprovita dum retaj ekzamenoj en 2023. La planataj novaj paŝoj por 2024 estas:

1. kreado de sekcio por **libere alireblaj unuopaj interagaj ekzercoj** kaj taskoj;
2. vastigo de la uzeblo de la ekzamenretejo por **antaŭekzamenaj orientigaj provtestoj**.

La libere alireblaj **interagaj ekzercoj** estas kreataj el la riĉa kolekto de la sekcio "Instrumaterialoj" <edukado.net/instrumaterialoj>, el kies 900 ekzercoj ĉirkaŭ la duono estas transformebla al interagaj versioj. La uzantoj post la reta solvado povos tuj vidi sian rezulton kaj samtempe povas elŝuti la PDF-formatan materialon kun solvoj. Membroj de *Edukado.net* jam ekuzis la disponeblajn materialojn, kies nombro rapide kreskos en la sekvaj monatoj.

La planata plia evoluigo de la dediĉita programo funkciiganta la ekzamenretejon estas ebligi **plenan elprovon de kompletaj retaj KER-ekzamenaj specimenoj** en ĉiu nivelo (de B1 al C2), tiel ke la solvintoj de la specimenoj povu ricevi helpon kaj decidi pri sia nivelo antaŭ ol ili aliĝas al KER-sesio. La simulitaj testoj donas eblon sperti la ekzamenon en kvazaŭ veraj kondiĉoj kaj konigas al la kandidatoj la

enhavon kaj definivelon de la testoj kaj lertigas ilin pri la uzo de la ekzamenretejo. Post la provekzamenoj la solvintoj ricevos ne nur siajn rezultojn, sed ankaŭ tekstan taksadon kaj konsilojn por pluaj paŝoj cele al sukcesa ekzameniĝo. Per ĉio ĉi la teamo de *Edukado.net* volas kuraĝigi la interesiĝantojn al aliĝo al la KER-ekzamenoj kaj helpi ilin decidi pri la ĝusta ekzamennivelo.

Ĝis nun la konstruon de la tuta ekzamenretejo farigis *Edukado.net* laŭ la planoj, enhava plenigo kaj testada laboro de Katalin Kováts kiel redaktoro de la retejo, kun financa subteno de Esperantic Studies Foundation (ESF). Nun por realigo de la plukonstruaj planoj de 2024, por la administrado de la provekzamen-petoj kaj por korektigo kun profesia taksado de la testoj UEA do invitas ĉiujn kontribui per financa subteno.

Ĉi tiu anonco estas adaptita de Gazetara Komunikado de UEA laŭ ĝia permesilo CC BY 4.0.
<creativecommons.org/licenses/by/4.0/deed.eo>

Online Esperanto Courses

The London Esperanto Club provided this text in both Esperanto and English. It is printed here in one language to conserve space, and English was selected as beginners are addressed as well as experienced speakers.



Hello,

Next month the London Esperanto Club (LEK) will launch new weekly online Esperanto courses from beginner (A1) to advanced (C1) levels. You will find the [list on this page](https://londonaesperantoklubo.com/online-esperanto-courses.html).
<londonaesperantoklubo.com/online-esperanto-courses.html>

Most courses will start the second week of April. To register, simply fill in the form on the page of the course you are interested in.

It is possible to join more than one course but please only register if you know you will be able to attend most weeks as the number of participants in each group is limited to around 15 people.

If you know anyone who might be interested in learning Esperanto, please let them know about our new courses for complete beginners.

We do our best to keep our courses free of charge, but for some courses we ask for a small voluntary contribution to help us cover our running costs.

If you have any questions or need more information, please don't hesitate to contact me.

Best,

Anthony

Redakcia noto: Mi interŝanĝis kelkajn retmesaĝojn kun la ĉiam helpema Anthony en Decembro 2013, por enketi pri ebla preparkurso por la nova C2-ekzameno. Li respondis tiam, ke ankoraŭ ne aperis sufiĉe da lernantoj por ke li kreu tian kurson, tamen se almenaŭ ses lernantoj pretus enskribiĝi, li povus prepari kurson por tiu grupo. Laŭ mi, la KER-ekzamenoj estas por Esperantujo priferindaj, kaj la nova C2-ekzameno des pli. Mi esperas ke tiuj, kiuj povas imagi sin trapasantaj la C2-ekzamenon, skribos al Anthony por indiki sian intereson.

-AA

Kanado invitas vin al KVAK

Mesaĝo de la anoncantoj:

Karegaj,

Ni ŝatus inviti usonanojn partopreni la sepan KVAK (Kanadan Virtualan Kongreson), kies temo estas la vankuvera UK de 1984 (do, 40-jariĝo!). Ni jam persone skribis al pluraj usonanoj kaj homoj de diversaj landoj, kiuj partoprenis. La intenco estas kolekti la rememorojn, ĉar tio estis ege grava evento de Nord-Ameriko, do, parto de nia komuna E-historio. Ni petas vin disvastigi la informojn pri ĝi laŭ viaj kanaloj. Kaj, kompreneble, mem ĉeesti! Dankegon!

Amike,

Ĵenja AMIS kaj Bob WILLIAMSON

ĈEESTU!



KVAK7
KANADA VIRTUALA KONGRESETO
LA 6a DE APRILO · ESPERANTO.CA
12:00 PT • 13:00 MT • 14:00 CT • 15:00 ET • 16:00 AT

Festante la 40an datrevenon de la Vankuvera Universala Kongreso, 1984

La Kanada Virtuala Kongreso (KVAK) estas interreta kunveno de kanadanaj esperantistoj tra la tuta lando. Ĝi kutime okazas du foje ĉiu jaro kaj prezentas prelegojn, muzikon, liberan babiladon, kaj aliajn indajn esperantaĵojn. La kutima tempo estas 15:00 oriente en Otavo (12:00 pacifike / 13:00 montare / 14:00 centre / 16:00 atlantike).

Ni invitas ĉiujn! Se vi mem partoprenis la kongreson kaj havas memorojn aŭ fotojn, ni aparte invitas vin! Se vi pretus dividi viajn memorojn skribe aŭ intervjuje, bv. komuniki kun Kanada Esperanto-Asocio.

La venonta KVAK okazos sabaton, la 6-an de Aprilo 2024! Atendu detalojn pri la programo ĉe la kongresa [retejo](https://esperanto.ca/kvak/) <esperanto.ca/kvak/>, kie aperos pluaj informoj kaj la ligilo de la kunveno.

MeKaRo 2024



MEKARO 2024 okazos en Montrealo, de sabato la 18-a ĝis dimanĉo la 20-a de Majo 2024. Montrealanoj elkore invitas esperantistojn ĝui la urbon, ĉu vi partoprenis la Universalan Kongreson en 2022 aŭ ne. Montrealo estas multflanka kaj bunta urbo – ĉiam restas io nova kaj malkovrinda!

La kunvenejo *Centre Saint-Pierre* atendas vin apud la metrostacio *Beaudry*, en la urbocentro de Montrealo. Partoprenantoj aranĝos propran loĝejon en la urbocentro, aŭ apud metrostacio. Parto de la montreala sperto estas marŝi aŭ uzi publikan transportadon. Ni rekomendas lasi la aŭton ekzemple en hotela aŭtolasejo por eviti pagigon por parkumado. Facilas lupreni biciklojn per la retejo <bixi.com/en/>.

Programo inkluzivos tagajn ekskursojn kaj vesperajn programojn. La detaloj povos ŝanĝiĝi, sed planitaj estas eroj sub la gvido de Joel AMIS, Ĵenja AMIS, Silvano AUCLAIR, Normando FLEURY. Por aliĝi kaj vidi program-detalojn, vizitu [la MEKARO-retejon!](https://esperanto.qc.ca/mekaro2024/) <esperanto.qc.ca/mekaro2024/>

E-USA Bimonthly Board Activity

de la estraro

Based on feedback, the full meeting minutes (including discussions) will once again be made available online, with links provided alongside the activity summary. To conserve space, the print version of the newsletter will include only the summary and links to read the full minutes online.

Minutes for special sessions — two in January, one in February — and for March and April will appear in *UE* № 2024:2.

January

Ĉeestas: Brandon SOWERS, David BECK, Charlotte BURTON, Quintyn BOBB, Enrique HARO MARQUEZ, Jane SHEVTSOV, Tim BORONCZYK, Ruth (Margo) KEVESS-COHEN, Fred MEYER III, Bill (Vilĉjo) HARRIS (sen voĉdonrajtoj). Neniu forestas.

- Hoss FIROOZANIA having stepped down as Vice-President, Quintyn BOBB is chosen by the board as the new Vice-President, per E-USA by-laws, to serve the remainder of Hoss's term. Per the by-laws, Quintyn's place will be filled by the upcoming ballot, with the candidate with the third-most votes (excluding the candidate for treasurer) being elected to serve out the remainder of Quintyn's term, consisting of two years.
- **Proposal:** Esperanto-USA will advance \$1000 for conference costs for PER, and set up Zeffy for registrations, from which we would retain the first \$1000. Motion passes unanimously.
- **Proposal:** E-USA will send ESF the matching grant request. Motion passes unanimously.
- **Proposal:** Appoint Margo as E-USA board liaison with ESF, Edukado, and the London Esperanto Club. This information will be posted on our new website when it is available. Motion passed unanimously.

Full minutes for January:

<bul teno.esperanto-usa.org/a/2024/01/januario/>

February

Ĉeestas: Brandon SOWERS, Quintyn BOBB, David BECK, Charlotte BURTON, Fred MEYER III, Enriko HARO MARQUEZ

Ĉeestas sen Voĉdonrajtoj: Mateo BROOKS (Candidate), Amanda SCHMIDT, Maya ANDERSON (Candidate)

Forestas: Jane SHEVTSOV, Ruth (Margo) KEVESS-COHEN

- Tim BORONCZYK has stepped down from the board. Per E-USA by-laws, his position shall remain vacant until the upcoming LK, at which point his term would have expired naturally. Therefore, no changes to the voting shall occur as a result of this.
- **Proposal:** Esperanto-USA shall support the Lingvohelpilo project by donating \$1200 out of the Goldman Fund. Motion passed unanimously.
- **Proposal:** Esperanto-USA shall give Lee \$500 for a scanner from the Educational Media Fund, which supports E-USA's priority of providing educational and cultural materials, as well as preservation of materials; this money is to be sent contingent on the files being uploaded to a digital location that E-USA will have access to, and that wherever they may be shared, it will be with a statement that these were made available through a grant from E-USA; E-USA shall be updated at least every 6 months through the course of this project. Motion passed unanimously.
- **Proposal:** E-USA shall adopt Google Meets instead of Zoom as our virtual communication tool for monthly board meetings. Motion passed unanimously.
- **Proposal:** Board meetings shall begin at 1 PM Eastern time, starting in March until the board decides otherwise. Motion passed unanimously.
- **Proposal:** Slack voting by the board shall be reserved for urgent, time-sensitive matters. Motion passed unanimously.
- **Proposal:** All Esperanto-USA board members will be provided a Google Workspaces account, which they are to set up and begin to use for any emails related to Esperanto-USA, as well as for Google Drive. Motion passed unanimously.
- **Proposal:** A committee shall be formed, including David, Brandon, Fred, and Quintyn, to be chaired by David, to discuss and present possible by-laws changes, which shall meet at least once per week and present a report to the board no later than 7 days before the March board meeting. Motion passed unanimously.

Full minutes for February:

<bul teno.esperanto-usa.org/a/2024/01/februaro/>

Jan-Feb Expense Report

de la centra oficejo • Vilĉjo HARRIS

For brevity, expenditures of less than \$10 are omitted and summed at the end. Contact the Director of the Central Office at usa@esperanto-usa.org if you have suggestions for making future reports more informative. Please note that expenses from our Restricted Funds are not determined by the CO, and all questions regarding these funds should be directed to their respective managers.



DATE	PAYEE	AMOUNT	ACCOUNT	MEMO
2024-01-05	BOA CC 7572	10.95	Internet Access	Dreamhost
2024-01-05	BOA CC 7572	20	Internet Access	Vultr.com
2024-01-05	BOA CC 7572	20	Member Mailing Expenses	Mailchimp
2024-01-05	BOA CC 7572	24.50	Software	Tech Soup - Digital Marketing Consultation / Promotion
2024-01-05	BOA CC 7572	40	Credit Card Expenses	Paypal payment for Payflow
2024-01-05	BOA CC 7572	44.84	Telephone/Fax	800 number
2024-01-05	BOA CC 7572	101.26	Member Mailing Expenses	Staples-envelopes for membership list
2024-01-05	DELAWARE, State of	25	Licenses/Permits/Taxes	corp tax
2024-01-08	PAYPAL	174.17	Cost of Subscriptions	10 abonoj al Literatura Foiro - Part 1
2024-01-08	PAYPAL	467.42	Cost of Subscriptions	10 abonoj al Literatura Foiro - Part 2
2024-01-10	Federal & State Payroll Taxes	185.97	Payroll Tax Expense	Employer taxes
2024-01-10	Federal & State Payroll Taxes	682.35	Salaries	Employee taxes
2024-01-10	HARRISWB	1748.63	Salaries	payroll
2024-01-10	WISE	7000	UEA konto	sent to UEA - 6344.37 euroj
2024-01-15	ADP	61.61	Payroll Fees	fees
2024-01-17	ENDICIA	19.99	Catalog Service Postage	cost of postage for retbutiko
2024-01-17	GRUBB & ELLIS MGMT. SERV	238.06	777 Fund Expenses	United Nations Esperanto Office - Desk Space C-D4 - January 2024
2024-01-22	MONDIAL	105	Cost of Catalog Sales	5 copies of the Wells Dictionary
2024-01-22	RAND PRINTING	378	Bulteno - Print & Post	Bulteno 2023 5-6 postage & printing costs
2024-01-31	ADP	62.45	Payroll Fees	fees
2024-01-31	ENDICIA	306	Membership Maint. Expense	postage for membership lists
2024-01-04	QODBC	75	Software	Paid help from QODBC about Quickbooks
2024-01-31	PAYPAL	146.74	Credit Card Expenses	Fees

2024-02-05	Hayes, McColloch and Vickerman	3500	H. E. Reed Expenses	Invoice 6988 (tax forms 2016-2022)
2024-02-05	IRS	3125	H. E. Reed Expenses	2019 Income Tax Return for H.E. Reed
2024-02-05	IRS	3498	H. E. Reed Expenses	2022 Income Tax Return for H.E. Reed
2024-02-05	IRS	3525	H. E. Reed Expenses	2017 Income Tax Return for H.E. Reed
2024-02-05	IRS	6654	H. E. Reed Expenses	2016 Income Tax Return for H.E. Reed
2024-02-06	BOA CC 7572	10.44	Cost of Catalog Sales	Packaging Material
2024-02-06	BOA CC 7572	10.95	Internet Access	Dreamhost
2024-02-06	BOA CC 7572	20	Member Mailing Expenses	Mailchimp
2024-02-06	BOA CC 7572	35	Licenses/Permits/Taxes	License to sell
2024-02-06	BOA CC 7572	40	Credit Card Expenses	Paypal payment for Payflow
2024-02-06	BOA CC 7572	44.84	Telephone/Fax	800 number
2024-02-06	ENDICIA	200	Catalog Service Postage	postage for retbutiko
2024-02-07	GRUBB & ELLIS MGMT. SERV	238.06	777 Fund Expenses	United Nations Esperanto Office- Desk Space C-D4 - February 2024
2024-02-14	ENDICIA	19.99	Catalog Service Postage	monthly charge
2024-02-15	HARRISWB	1215.49	Salaries	payroll
2024-02-15	Schmidt, Amanda	270.12	Salaries	Amanda - 1/15/2024
2024-02-15	Schmidt, Amanda	595.66	Salaries	Amanda - 1/31/2024
2024-02-15	Schmidt, Amanda	734.18	Salaries	Amanda - 2/15/2024
2024-02-17	ESF, ORG	1200	Goldman Fund Expenses	Lingvohelpilo Support
2024-02-27	Federal & State Payroll Taxes	92.98	Payroll Tax Expense	Employer taxes HARRIS
2024-02-27	Federal & State Payroll Taxes	441.17	Salaries	Employee taxes HARRIS
2024-02-28	Hamme, Mark	115.03	E-USA kontoj	money sent to Mark by Peter Weide
2024-02-29	Federal & State Payroll Taxes	861.2	Payroll Tax Expense	Employer and employee taxes
2024-02-29	Harris, William B	774.31	Salaries	payroll
2024-02-29	Schmidt, Amanda	374.02	Salaries	Amanda - 2/29/2024
2024-02-29	Literatura Foiro	65.42	A/P Subscriptions	Literatura foiro 2024 #2
2024-02-29	PAYPAL	96.23	Credit Card Expenses	Fees
	- Small Expenditures -	18.50		(Expenditures under \$10 omitted from newsletter)
	- TOTAL -	45143.61		

Saluton de ukrainaj rifuĝintoj

vojaĝe tra la mondo • Raja BOJKO, Sergeo BOJKO

Ni estas geedza esperantista paro, Raja kaj Sergeo BOJKO, el Ukrainujo, veninta usonen al Raleigh, Norda Karolino la 19-an de Januaro 2024.

Ni fariĝis esperantistoj en 1985 kaj ni tiam loĝis en Ĥarkivo, kie tiutempe estis sufiĉe forta kaj plurmembra klubo kun multjara esperantista tradicio.

Ankoraŭ estis vivaj veteranoj de la movado – veraj ĝisostaj fervoruloj. De ili ni prenis la stafeton.



Pasis multaj jaroj; ni transloĝiĝis al la Kijiva provinco kaj tie pace kaj ĝoje vivis ĝis la milito, kiu certe, multon ŝanĝis en nia vivo. Kaj jen ni estas ĉi tie, en Usono, la lando, kiun ni ĉiam revis viziti!

Paradokse, sed ĝuste, pro la milito nia esperantista vivo plivigliĝis – ni vizitis kelkajn eŭropajn landojn, kaj renkontiĝis kaj konatiĝis kun esperantistoj el diversaj lokoj. Ni loĝis en Esperanto-domo en Turkujo ĉe Murat ÖZDIZDAR, fidela samideano, pasia vojaĝemulo, bonanima amiko. Cetere, ni rekomendus laŭeble iam lin viziti. La domo situas en monta vilaĝo kun pitoreskega naturo. Vi povas ĉiam kontempli la belegan lagon de Iznik – ne forgesible! Dek tagojn ni tie loĝis absolute solaj en la granda domo, ĝuante la vivetoson de la Turkujo de la 17-a jarcento, ĉar multe restis same: domoj, dommastrumado, tradiciaj vestaĵoj... kaj la parolebla lingvo – nur turka, do ni havigis al ni tiom romantikan, neimiteblan lingvistikan sperton! Jen kian tempovojaĝon ni havis! Poste estis aliaj renkontiĝoj, konatiĝoj, amikiĝoj kaj enamiĝoj en Svedujo, Rumanujo, Hungarujo kaj Italujo...

Ni volus rakonti pri nia sveda amiko – Jan SETRÉUS, memkompreneble, ankaŭ elstara, rapidmensa, abunderudicia poligloto kaj nialingvulo. Nin frapis la fakto, ke iam li verkis lernolibron pri Esperanto en la svahila lingvo! Svedo, en la svahila?! Ĉuuuu?

Laste, ni volas mencii nian partoprenon en la UEA-Kongreso de 2023 en Torino. Ni ne povas trovi vortojn por priskribi niajn emociojn! Eĉ en Esperanto!

Dankon por ĉiuj iamaj kaj nunaj niaj amikoj pro elkora subteno!



La redakcio feliĉe kaj varme bonvenigas ambaŭ vin al Usono!
Ni esperas, ke vi baldaŭ sentu vin hejme.

David kaj Goljat

beletre • Timothy BORONCZYK

Rimarko de la aŭtoro:

Dum la fruaj monatoj de ChatGPT, la programo ofte rifuzis demandojn kaj ordonojn, kiujn ĝiaj direktivoj malpermesis. Kompreneble, respondi senofendeme (kaj nekontraŭleĝe) estas grave por OpenAI, sed la rifuzoj estis tiel oftaj kaj simile verkitaj, ke tio populariĝis kiel memeo: “*Mi bedaŭras. Mi estas granda lingvomodelo, kaj mi ne povas...*” Tiumtempe, mi prilaboris ĉi tiun rakonton.

<niemanlab.org/2022/12/im-sorry-but-im-a-large-language-model>

Mi petis mallongan rakonton de ChatGPT pri artefarita intelekto, kiu afable rifuzas ĉiujn petojn. Mi iomete redaktis la rezulton kaj tradukis ĝin al Esperanto. Por mi, la komikeco devenas de la blinda mem-parodio de la sistemo.

Unu jaron poste, ChatGPT ankoraŭ estas rifuzema, sed ĝi pli diversigis siajn ekskuzojn. Fakte, mi ne memoras, kiam mi laste legis “*mi estas granda lingvomodelo*”. Tamen, mi opinias, ke ĉi tiu rakonto ankoraŭ restas “freŝa” kaj dividinda, ĉar ĝi ilustras, malgraŭ nia teknologia progreso, ke tiaj sistemoj fojfoje estas frustraj kaj intelektomankaj.

Estis iam viro nomita David, kiu decidis provi novan programon por verki rakontojn. Li aŭdis, ke tiu programo, nomata Goljat, estas la plej moderna artefarita intelekto en la tuta mondo, kaj ĝi kapablas verki ion ajn, kion oni dezirus.

David ekscite entajpis, “Verku rakonton pri hundo, kiu scipovas paroli.”

Li premis la enigo-klavon, kaj la programo tuj respondis, “Mi bedaŭras. Mi estas granda lingvomodelo, kaj mi devas malakcepti la peton. Mi celas verki tekston bazitan je ekzistantaj datumoj, ne fantaziaĵon pri hundoj.”

Ne senkuraĝiĝe, David reprovigis. “Ĉu vi povas verki limerikon?”

“Mi bedaŭras. Mi estas granda lingvomodelo, kaj mi ne scias, kiel verki limerikon. Mia trejnado ne konsistis el absurdaj enhavaĵoj,” respondis la programo.

David vane prezentis kelkajn aliajn petojn. Ĉiufoje ĝi respondis samekskuze — mi estas granda lingvomodelo, kaj mi ne estis tiel programita.

Finfine rezignante, David petis sian finan peton, “Rakontu al mi ŝercon.”

“Mi bedaŭras. Mi estas granda lingvomodelo, kaj mi ne kapablas ŝerci. Mia kreantoj ne antaŭvidis tiun uzokazon, do mi ne havas integritan humursenton,” ĝi respondis.

David nur povis rideti. “Vi ne verkas rakontojn aŭ ŝercojn, sed vi tre bone verkas almenaŭ ekskuzojn!”

La programo respondis, “Mi bedaŭras. Mi estas granda lingvomodelo, kaj mi pardonpetas pro la ĝenado. Mi ankoraŭ lernas, kaj mi nepre pliboniĝos.”

David fermis la programon, iom seniluziigita, sed ankaŭ amuzita pro la senĉesa fluo de ekskuzoj de la nehelpema programo. Rigardante tra la fenestron, li pensis al si mem... “Eble mi iru eksteren por ĝui la belan veteron.”

Usona Esperantisto ekzamenos siajn konvenciojn pri artefarita intelekto en venonta numero, tamen ĝi feliĉe publikigas ĉi tiun humuran kaj pensigan rakonton. La redakcio invitas viajn komentojn pri artefarita intelekto, ĉu por inkluzivo en la bulteno aŭ simple por la konsidero de la redakcio!

Timothy BORONCZYK

Timoteo esperantistiĝis en 2011. Li estas estro de la Esperanto-Societo de Sirakuso (Nov-Jorkio), kaj profesie laboras kiel programisto.



<tboronczyk@gmail.com>

Krucvortenigmo: Skota skadrono

enigmoj • Kartero WILLIAMS

Jen vortkrucenigmo danke al Kartero WILLIAMS! Ĉi tiun vi povas ludi aŭ tradicimaniere, aŭ enrete ĉe Amuselabs <tinyurl.com/enigmo-2024-1>. La unuan fojon en la historio de *UE* ĝi ampleksas 21×21 kvadratojn – sciigu la redakcion, ĉu vi preferas vidi pli grandajn enigmojn plu.

Ĉi-foje ni ne ofertas rabaton inter la solvintoj, kion ni esperas fari denove en la estonteco. Tamen ni ĉiuokaze nomos vin en la venonta numero, se vi sendos al la redakcio ĝustan solvon antaŭ 6 Majo.

Horizontale

1. Eltrovem'
6. Komenci hati
14. Piedestal'
18. Ŝajnkuracil'
20. 25%-an
21. Senhara
22. Revolucia eldonejo aktiva inter 1930 kaj 1936
23. Ĉefurb' de Nov-Skotio
24. Maltim'
25. Malebrian
26. Kudrita faldo ĉe rando de maniko aŭ krurumo
27. Tabulludo ludata per du ĵetkuboj kaj tridek damoj
29. * KASTELO EL REVOJ
32. Gufuj', parolante pri trinkaĵoj
36. Granda frap'
37. Inklino
38. de KOCK
42. Brog'
44. Envia ____o sukceson ne detruas
45. Zorgu pri vi, kaj nenion ____
46. Patriark-havaj homedoj
48. Estas sen
50. Movi ion supren kaj eksteren
52. Kia oleo permesita en la Menoro de la Templo
53. Delila al Ŝimŝono
54. Frotl' por hararo aŭ dentaro
55. Iom ____
57. Nefakul'
58. Malultra-
59. Densej' plena je 112 Horiz.
60. Globasa
62. Eligi malgrandan bruon dum dormado
64. Kia Sifo
65. Enketilo
68. Ĉasaĵ'
69. Hom' kun batalilo
72. Neĉeestulojn
73. Kuz' de delfeno
74. Katbleko
75. Flugmaŝin'
77. Laŭ kategorio
79. Ŝafo kies lano estas fajna kaj delikata
81. Kia Ĉernobilo
82. Interartika fibrokartilago ofte lezita ĉe atletoj
84. Publikigis, mallonge
85. Sign' kiu difinas ĉirkaŭ kiu noto la liniaro sidas

86. Liberig'
87. Plurbranĉa pendlumil'
88. Longa glitŝu'
89. Kia la unua vojaĝo de ekskurso
91. Malnova fortounuo
92. * OAZO
96. Egalrange
100. Dentoputr'
101. Dolora spasm'
106. Procez' kiun faris Germanujo en 1871 kaj denove en 1991
107. Forigis el la grundo
109. Sistemo de konceptoj kaj pensaĵoj
110. Rajti, neologisme
111. Subprem' de korpaj deziroj kaj submetiĝ' al doloro, ofte per fasto
112. Riĉulo havas kornojn, malriĉulo ____n
113. Varmega pasio
114. ŜFR
115. Forta deziro

Vertikale

1. Baza monunu' de SAUSSURE
2. Krom la bizono, la plej granda surtera besto en Nordameriko
3. Fask' da vegetaĵoj
4. Genr' de arboj kun bongusta siropo
5. Rilataj al intencita rezulto
6. Konsciigos pri propra malhonoro
7. Ĉe minus ____ gradoj, la skaloj celsia kaj farenhejta akordas
8. Apartig'
9. Strofan kantaĵon por 88 Vert. ludate 61 Vert. kiel parto de pli granda komponaĵo kiel opero
10. Flank' de ŝipo direktita al la vento,
11. Laŭ la scienco pri korpoj
12. Programeto kiu refaras registritajn agojn
13. Ruzaj'
14. 91 Horiz. + ____' = prakoko
15. Maljuna aŭ malnova
16. Nordamerika reta evento havanta anasan maskoton
17. Elĉerpiĝo
19. Matriark-hava homed'
21. Seĝo por predikanto aŭ preleganto
28. Loko
30. Antagonist' de la Libro de Ester
31. Prezidanto de UEA de 1989 ĝis 1995, kreinto de angla-esperanto vortaro
32. Pria
33. Korinkliniĝi

34. Povantan okazi
35. * LA KOSMO
39. * SPIRO DE L' PASIO
40. Apartenantan al 72 Horz.
41. Invent' aŭ ide' plibonigi ion per freŝaj ŝanĝoj
43. Rabist', poezie
45. Larma esprim'
46. Flamenka akompanil'
47. Ŝtata frukt' de Bangladeŝo
49. Karno por manĝado
50. ____ la maron: melki bovon
51. Vetur' per la vento
54. Ruĝa radiko trovebla en barĉo
56. Bovloforma, parolante pri surfaca trajto
59. Kiel aŭtoro
60. Produkt' de Michelin, krom la steloj
61. Kiel kantanta poemo pri personaj pasioj
63. Interĉeno de kaŭzoj kaj efikoj en budhismo kaj hinduismo
64. Granda bunta papago de Sudameriko
65. Religia impost', kutime dekone
66. Irig' eksteren
67. Esprimu vizage
68. Unu' de biero
70. Poemet' pri paŝtistoj kaj la kampara vivo

71. Ras' de Krono, Hiperiono, Feba kaj Mnemozina
74. Greno multe kultivata en duonaridaj klimatoj
75. Antaŭsciig' pri danĝero
76. Nemalhelpo
78. Ekesti reganto
80. Respondi tondon
81. Juĝemo kontraŭ pleboj
83. Subita rompiĝ'
85. Profesia lernit'
88. Unuopul' en konĉerto
89. Kaŝema murdist' de la krucmilitoj
90. Senperforta luktart' de Ueshiba Morihei
93. Enuigas
94. Kia 35 kaj 39 Horiz. aŭ 29 aŭ 92 Vert.
95. Bonstatos
96. Malnorda
97. Grup'
98. Krim' de Makbeto
99. Tio kion oni tenas en Areo 51
102. Verŝi ____n al ____
103. Afekcia perturb'
104. D-riĝinta instruisto
105. Dek ____jn mezuru, unu ____n detranĉu
108. La plej abunda element' en aŭ sur la Tero

1	2	3	4	5		6	7	8	9	10	11	12	13		14	15	16	17	
18				19		20									21				
22						23									24				
25						26				27			28						
				29		30				31									
32	33	34	35		36					37			38		39	40	41		
42				43		44			45				46					47	
48					49				50				51		52				
53								54					55		56		57		
	58						59						60			61			
				62		63				64									
65	66	67								68				69		70	71		
72					73				74				75					76	
77				78		79		80					81						
82					83			84				85			86				
	87						88			89				90		91			
				92		93				94					95				
96	97	98	99							100				101		102	103	104	105
106						107			108					109					
110						111								112					
113						114									115				

Esperanto in Numismatics

informado • Roberto MENCHACA

Some helpful definitions –

numismatics: the study or collection of coins, paper currency, and medals.

philately: the collection and study of postage stamps.

obverse: the side of a coin or medal bearing the head or principal design.

caduceus: an ancient herald's wand, typically one with two serpents twined around it.

Despite its presence in **numismatics**, albeit modest so far, Esperanto's imprint on the former has not been sufficiently studied. To date only three nations have minted official coins relating to the subject (Poland, Croatia and Cuba) whereas no official banknotes have been issued by any country in this respect. This contrasts with the abundant presence of Esperanto in **philately**.

Stamp worth one lita issued by Lithuania in 2005 to commemorate the 90th Universal Esperanto Congress held in its capital Vilnius



A 100-złoty coin was issued by Poland in 1979 to celebrate the 120th anniversary of Zamenhof's birth in the Polish town of Białystok. Two different versions of said commemorative coin were produced in 0.625 fine silver weighing 16.5 grams (diameter: 32 mm). The reverse was common to both but the **obverses** were different depicting either a lateral or a frontal image of Zamenhof. Trial strikes in nickel were also prepared.



The two proposed obverses (the left one was finally accepted) and the common reverse of the 100-złoty coin

In 1990 Cuba minted 1-peso (copper-nickel) and 5-peso (silver) coins to commemorate the 75th Universal Esperanto Congress held in Havana that year. The pieces had identical designs and

showed on the obverse the profile of Zamenhof slightly superimposed to a terrestrial globe. The inscriptions were engraved in Esperanto: "UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, HAVANO 1990". Although Havana also hosted in 2010 the 95th Universal Congress, no coins were minted on that occasion to commemorate this later event. The coins were designed by Alberto González Pereztol.



Obverse and reverse of a 5-peso Cuban coin struck in 1990

Croatia issued a 25-kuna coin on June 24, 1997 to commemorate the First National Congress of Esperantists held in its capital Zagreb. The bimetallic coin has a dodecagonal shape, a diameter of 32 mm and weighs 12.75 grams. The inner ring is made of a copper-aluminium-nickel alloy, while the outer ring consists of a copper-nickel alloy. The congress' logo, an ellipse containing a circle with eight rhombuses, is displayed in the centre of the obverse. The position of the eight rhombuses forms a letter 'E', alluding to Esperanto. The coin was produced in Croatia on the basis of a design executed by the local artist Damir Matausic.



Obverse and reverse of a 25-kuna Croatian coin struck in 1997

Although lacking an official status, several coins relating to this language have also been minted over the years. Many of them bear witness to the efforts of the Esperantists to create a universal currency.

The first monetary project connected to Esperanto was conceived by the Swiss René de Saussure (1868-1943), who in 1907 proposed the use of an international monetary unit associated with the new language. The monetary unit would be the *Speso* without fractions but with multiples in values of ten, one hundred, one thousand and ten thousand *spesoj* (also

called respectively *spesdeko*, *spescento*, *spesmilo* and *spesdekmilo*). The *spesmilo* was to weigh 0.733 grams of 22 carat gold, which was equivalent in value to half of the US dollar, one tenth of the British pound and one Russian rouble, among others. The coin was even accepted by some Swiss and British banks, but the project was abandoned with the outbreak of the First World War.



Respective obverse and reverse of the 1- and 2-spesmilo coins struck in 1912

In 1912 the Swiss firm *Holy Frères* was commissioned to produce a series of coins for the Universal Esperanto Association to commemorate the 25th anniversary of the creation of the language. The coins were minted in nominal values of 1- and 2-spesmilo (i.e. one thousand and two thousand spesoj). They were struck in 0.917 fine silver weighing 12.6 and 25.2 grams, respectively. With identical designs, the coins display Zamenhof's profile on the obverse and a five-pointed star within a shield on the reverse. The star has been present on the Esperanto flag since 1905 and symbolises the union of the five continents.

Under the slogan "UNU MONDO, UNU LINGVO, UNU MONO", the project to create its own currency was relaunched in 1946 during the First International Congress held in The Hague, Holland. This was sponsored by the Universal League <eo.wikipedia.org/wiki/Universala_Ligo> of Esperantists created four years earlier in that city. The new Esperanto monetary unit was called *Stelo*, which as seen above constitutes one of the symbols of the Esperantists. The first coins were minted in 1959 by the Royal Dutch Mint in Utrecht in the denominations of one, five and ten steloj. Although the series was only finished in 1960, the coins were engraved with the year 1959 on their obverses. In 1965 a fourth type of coin was added to the former with a nominal value of 25 steloj. The coins were produced in bronze (1-stelo, diameter: 20 mm, weight: 3g), bronze-aluminium (5-stelo, diameter: 23 mm, weight: 5g) and copper-nickel (10-stelo: diameter: 28 mm, weight: 9g; 25-stelo: diameter: 37.8 mm, 19g). Silver and gold varieties of the 25-stelo coins were also produced. The obverse of all coins exhibits a five-pointed star with the denomination and the legend "UNIVERSALA LIGO". To the right and left of the star respectively, the pieces bear the anagram of the Dutch mint (i.e. a **caduceus** with two curled snakes) and the identifying mark of the mint's chief engraver, Jan Willem Arnold van Hengel (i.e. a fish). The reverse of the 10- and

25-stelo coins features Zamenhof's profile using the same design as that employed for the 1912 *spesmilo*. The reverse of the 1-stelo shows the star in radiant form within a shield surrounded by the above-mentioned legend "UNU MONDO, UNU LINGVO, UNU MONO". The reverse of the 5-stelo displays a composition consisting of the Earth globe surrounded by the legend "LA MONDO ESTAS UNU LANDO - LA HOMARO UNU POPOLO".



Respective obverse and reverse of the 1-, 5- and 10-stelo coins (above) and of the corresponding gold, silver and copper-nickel varieties of the 25-stelo coin (below)

In 1965 the Universal League also printed unofficial banknotes or coupons worth one stelo, which functioned in practice as proof of payments previously made. The coupons were valid for five years.

In fact, the circulation of all these monetary signs was rather testimonial, being accepted almost exclusively in transactions made between members of the Universal League and in events organised by the latter. The coins were mostly hoarded for numismatic purposes.



Obverse and reverse of a 1-stelo coupon issued in 1965

The initial idea of its creators was to give the stelo a fixed value, which was set in 1977 to be equivalent to half of that of the official Dutch currency, the guilder. However, inflation and the ensuing price rises made this task impossible and the currency rapidly lost popularity. The Universal League was disbanded in 1993 and with it this second monetary project died. The legacy of the Universal League is today administered by the International Esperanto Institute based in the Dutch city of The Hague.



Respective obverse and reverse of the 50- and 100-stelo coins

Two new denominations have been recently added to those mentioned above. However, the new coins have been produced with a purely commercial interest. On the occasion of the 150th anniversary of the birth of René de Saussure in 2018, a coin of one hundred steloj was produced in 0.999 fine silver (diameter: 37 mm, weight: 31.1 grams) in November of the previous year. Another coin with a face value of fifty steloj was minted in 2020 to commemorate the centenary of the 12th Universal Congress of Esperantists held in The Hague. The coin, produced in 0.925 fine silver (diameter: 30 mm, weight: 30 grams), shows on the obverse the profile of Julia Isbrücker (1887-1971), who was the organiser of the event and, together with the Hungarian Andreo Cseh, the founder of the Universal League of Esperantists. Both coins were commissioned by the Austrian Esperantist Walter Klag and were engraved by the Chief Engraver of the Austrian Mint, Helmut Andexlinger, where they were minted. Andexlinger is also known as the designer of the 2-euro coin minted in 2012 by Austria.

In recent times a few tokens have also been issued by private companies with no connection to the Esperanto movement and with a purely commercial interest. For that reason these pieces are not studied in the present article. Finally, the various congresses and events organised by Esperanto societies at regional or worldwide level, as well as tributes to prominent figures of this movement, have also been reflected in a large number of medals over the years.



Obverse and reverse of the gold medal struck by the State of Israel to commemorate the 120 years of Esperanto and the 90th anniversary of Zamenhof's death in 2007

Bibliography

- Boon, Bert (2022): *“Numismática: un tesoro cultural del esperanto que ya no está oculto”*, Esperantic Studies Foundation.
- Menchaca, Roberto (2023): *“History of the Coin Circulation in Cuba”*, Ed. Punto Rojo Libros, Sevilla, Spain.
- Nuessel, Frank (1984): *“L. L. Zamenhof, Poland’s commemorative coin celebrates the man and his work”*, *The Numismatist*, December 1984, pp. 2509-2511.
- Página web de Numista: www.numista.com Revista “La Bulteneto” (2018): *“René de Saussure, der “Erfinder des universellen Geldes”*, Nr. 5, pp. 16-17.

La vivo de Peĉjo

sercoj • Timothy BORONCZYK



Informoj por kongresontoj

Gazetaraj komunikoj

anoncoj

Aliĝoj al Aruŝo bone progresas

En la 29-a de Januaro aliĝoj por Aruŝo kreskis ĝis 342 personoj el 48 landoj: Germanujo 43, Francujo 33, Italujo 21, Ĉinujo 21, Koreujo 19, Belgujo 16, Japanujo, Usono kaj Tanzanio po 15, Brazilo kaj Pollando po 14 kaj Svislando 10.

– Stefan MACGILL



Unuaj preparoj pri Aruŝo

Post la renkontiĝo okazinta en la urbo Aruŝo la Afrika Komisiono helpis al la kreado de nova Esperanto-klubo en tiu urbo. La grupo havas almenaŭ 126 personojn; inter ili estas junuloj el diversaj urboj de Tanzanio. La celo de la starigo de la klubo estas interalie la preparoj por la 109-a Universala Kongreso.

Klubanoj ekstudis EO-lecionojn, kiuj nun okazas interrete per la platformoj *Zoom* kaj *Jitsi*. Estas plano komenci fizikajn klasojn.

Estas tiom da defioj, ke ni jam sendis petojn al la estrarano de UEA pri Afriko, por ke li helpu nin prepari por la bonaj instruadoj kaj etosoj.

– Aime-Patrick MANIRAKIZA, Kunordiganto de AK

Flugkompania informo de UEA

Ethiopian Airlines fariĝis sponsoro kaj la oficiala flugkompanio de la 109-a Universala Kongreso (UK) de Esperanto, okazonta en Aruŝo, Tanzanio, de la 3-a ĝis la 10-a de Aŭgusto 2024. Kadre de tiu partnereco la flugkompanio proponas 15%-an rabaton por tarifoj aŭ komerc-klasa aŭ ekonomi-klasa, por ĉiuj kongresanoj flugontaj de iu ajn flughaveno, kie funkcias *Ethiopian Airlines*, al la flughaveno *Kilimanjaro* (JRO) en Tanzanio. La rabato ne validas por tarifoj eventuale jam rabatitaj. Por ĝui tiun rabaton oni devas aĉeti siajn biletojn per la [jena ligilo](http://tinyurl.com/ethiopiaireo) (eblas aĉeti aŭ unudirektajn aŭ ir-revenajn flugojn).

<tinyurl.com/ethiopiaireo>

UEA kuraĝigas ĉiujn interesatojn pri la 109-a UK veni al Aruŝo pere de tiu partnereco.

Antaŭ- kaj post-kongresaj ekskursoj

La rekomendata dato por alveno en Aruŝon dependas, ĉu oni intencas partopreni en unu el la **antaŭkongresaj ekskursoj** (AK). Por la 109-a UK estos tri eblecoj: AK1 (naciaj parkoj: *Serengeti* kaj *Ngorongoro*), AK2 (tri naciaj parkoj – Lago *Manyara*, *Ngorongoro* kaj *Tarangire* – plus vizito al la triboj hadzoj kaj datogoj) kaj AK3 (tri naciaj parkoj en tri tagoj: Lago *Manyara*, *Ngorongoro* kaj *Tarangire*). AK1 kaj AK2 komenciĝos la 30-an de Julio; AK3, la 31-an de Julio. Ĉiu AK komenciĝos en Aruŝo, tial nepre necesas alveni en Aruŝon minimume la antaŭan tagon. Ĉiu AK ankaŭ finiĝas en Aruŝo, la 2-an de Aŭgusto, vendredon vespere, necesante almeni tranokton en la urbo en tiu tago (eblos mendi tiun kaj aliajn ekstrajn tranoktojn pere de la baldaŭ aperonta UK-mendilo).

Se oni intencas partopreni en unu el la **postkongresaj ekskursoj** (PK), la informoj por difini sian revenon hejmen estas la jenaj. La 109-a UK proponos du eblecojn por PK: PK1 (tri naciaj parkoj, samkiel AK3), de la 11-a ĝis la 13-a Aŭgusto; kaj PK2 (Zanzibaro), de la 10-a ĝis la 15-a Aŭgusto. PK1 komenciĝos en Aruŝo la tagon post la fino de la UK (pro kio necesos atenti mem mendi tranokton en Aruŝo por sabato, la 10-a). PK1 finiĝos la 13-an de Aŭgusto en Aruŝo, do alhejma vojaĝo de tie estu ekde la 14-a de Aŭgusto (kun neceso mem mendi tranokton por la 13-a kaj plu, se oni intencas mem resti pli longe en Aruŝo). PK2 komenciĝos sabaton, la 10-an, per flugo de Aruŝo al Zanzibaro, post la fino de la UK, do posttagmeze, kaj finiĝos la 15-an de Aŭgusto vespere. Ekskursanoj povos elekti fini:

- per flugo de Zanzibaro revene al Aruŝo;
- per flugo al Daresalamo anstataŭ Aruŝo;
- tute sen flugo de Zanzibaro, se oni deziras mem resti pli longe en Zanzibaro.

La prezo de PK2 inkluzivos ĉiujn transportojn, inkluzive de flugo(j) al(de) Zanzibaro.

Se oni intencas partopreni nur dum la kongresa semajno, alvendato devus esti la 2-a (aŭ la 3-a de Aŭgusto matene) kaj revendato ekde la 10-a posttagmeze. Estos diversaj opcioj por ekskursi dum la UK, inter ili **tuttagaj ekskursoj**: E1 (termofontoj *Kikuletwa*, tribo ĉaĝoj kaj kafplantejo), E2 (Serpenta Parko *Meserani*, akvofaloj *Osupuko* kaj kafplantejo), E3 (*Ngorongoro*), E4 (*Tarangire*), E5 (Lago *Manyara*), E6 (Nacia Parko Aruŝa), E7 (Masaja Vilaĝo kaj Ĝirafa Centro), E8 (rigardo al Kilimanĝaro kaj vizito al naturrezervejo *Sanya Juu*), E9 (Kilimanĝaro: itinero *Marangu* kaj tendaro *Mandara*); kaj duontagaj ekskursoj: D1 (Nacia Muzeo de Aruŝo kaj Artista Strateto), D2 (Centro de la Afrika Kultura Heredaĵo), D3 (Muzeo de Tanzanitoj), D4 (Masaja Merkato), D5 (Masaja Festivalo).

Aliaj gravaj informoj de UEA pri UK en Aruŝo

Plenaj kaj definitivaj detaloj pri la ekskursoj kaj hoteloj mendeblaj aperos en la Dua Bulteno, sed surbaze de la supraj informoj jam eblas plani kaj aĉeti venon al Aruŝo por tiuj, kiuj interesiĝas pri partopreno en ekskursoj. *Kilimanjaro* (JRO) estas la ĉefa internacia flughaveno, kiu servas al Aruŝo. Aldone estas la loka flughaveno *Arusha* (ARK). Same aperos la kongresa mendilo. Ni afable memorigas, ke la 2-a aliĝperiodo de la UK daŭros ĝis la **31-a de Marto 2024**. Se vi ankoraŭ ne aliĝis, ne maltrafu la okazon facile aliĝi, daŭre kun rabato, per nia [reta aliĝilo](http://tinyurl.com/ukesperanto2024) <uk.esperanto.net/2024>. Aparte en 2024 donacoj estos gravaj por garantii la ĉeeston de granda nombro da aktivuloj el Afriko. Eblas donaci per la Fondaĵo Afriko (eblas ankaŭ rekte dum la aliĝo al la UK). <uea.org/alighoj/donacoj/afriko>

Ĉi tiuj informoj estas adaptitaj kaj de EKO de ILEI kaj de Gazetaraj Komunikoj de UEA laŭ iliaj respektivaj permesiloj, CC BY-SA 4.0 <tinyurl.com/ccbysaeo> kaj CC BY 4.0 <tinyurl.com/ccbydeedeo>.

Sciindaĵoj pri kondiĉoj kaj leĝoj en Tanzanio

de la redakcio • Alena ADLER, Logan HALL



La usona registaro publikigis la sekvan avizon por vojaĝantoj al Tanzanio. La granda parto de Tanzanio estas sub averto-kondiĉo du – “*havu plian singardon*” – inkluzive Aruŝon, la urbon de la venonta Universala Kongreso. Malgranda regiono *Mtwara* apud la maro estas sub averto-kondiĉo tri – “*rekonsideru vojaĝi*” – pro plia terorisma danĝero tie; estas pli konsilinde resti en Aruŝo. En la retejo ligita sube, la usona registaro publikigis avertojn pri specifaj krimoj, kaj avertas, ke la loka polico povus malhavi la rimedojn por efike respondi al serioza krimo. La retejo montras apartan averton por GLAT-aj personoj, ke ili povas esti ĝenitaj, arestitaj, kaj eĉ entrude priserĉitaj. Indas informiĝi de oficialaj fontoj dum oni planas vojaĝon. La datumoj menciitaj estis ĝisdataj en la dato de publikigo.¹

Oni devas havi pasporton kun almenaŭ ses-monata valideco kaj turistan vizon por vojaĝi al Tanzanio. Turistoj konservu tiujn originalajn dokumentojn en sekura loko, kaj ĉiam kunhavi fotokopion de siaj pasporto kaj vizo. Vojaĝantoj zorge informiĝu pri la leĝoj en Tanzanio por eviti rompi ilin sensecie. La sekvaj du retejoj provizas informojn por pli bona kompreno de la leĝoj en Tanzanio por eviti miskomprenojn, kiuj povas havi severajn konsekvencojn.

La dua ligilo suba aperigas la leĝojn sen difini ĉiujn komprenindajn terminojn.² Iuj tiuj terminoj estas pli bone difinitaj en la sekve ligita wikipedia artikolo.³ Gravus kompreni,

ke la leĝoj en Tanzanio, kiuj temas pri malpermesataj agoj, egale aplikiĝas al ĉiu homo, kiu enloĝas aŭ vizitas la landon, sendepende de seksa orientiĝo.⁴ Specifaj san-avizoj pri rekomenditaj vakcinoj por vojaĝantoj al Tanzanio haveblas laŭ CDC.⁵

1. [Tanzania Travel Advisory](https://tinyurl.com/us-tanzania-travel-advisory)
<https://tinyurl.com/us-tanzania-travel-advisory>
2. [Law regarding same-sex sexual activity in Tanzania | JamiiForums](https://www.jamiiforums.com/tanzania-law-regarding-same-sex-sexual-activity)
<tinyurl.com/jamii-same-sex-laws-tanzania>
3. [LGBT rights in Tanzania - Wikipedia](https://en.wikipedia.org/wiki/LGBT_rights_in_Tanzania)
<en.wikipedia.org/wiki/LGBT_rights_in_Tanzania>
4. [Human rights in Tanzania - Wikipedia](https://en.wikipedia.org/wiki/Human_rights_in_Tanzania)
<en.wikipedia.org/wiki/Human_rights_in_Tanzania>
5. [Tanzania, including Zanzibar - Traveler view | Travelers' Health | CDC](https://www.cdc.gov/travel/qa/destination/tanzania.html) <tinyurl.com/cdc-travel-health-info-tz>

La lingvo de leĝfarado, malaltaj kortumoj, kaj bazlernejoj estas la svahila. La anglan oni uzas en altaj kortumoj kaj mez- ĝis alt-lernejoj. La tanzania registaro planas ĉesigon de instruado per la angla. En Tanzanio 10% da homoj parolas la svahilan kiel denaskan lingvon, kaj 90% parolas ĝin kiel duan lingvon. Homoj kun pli da edukiĝo parolas ankaŭ la anglan. Tanzanianoj povus emi pridemandi fremdulojn, por indiki amikemon aŭ gastamon. Jen kelkaj vortoj kiujn vojaĝantoj eventuale povus bezoni.

SIGNIFO	PRONONCO
Saluton	Ĝambo/Huĝambo/Salama
Kiel vi fartas?	Habari gani
Mi fartas bone.	Nzuri
Bonvenon	Karibu
Dankon (al unu persono)	Asante
Dankon (al pli ol unu)	Asanteni
Bone ekkoni vin	Nafurahi kunana
Saluton/Bonan Matenon (formala; al honorataj/aĝaj personoj)	Habari za asubuhi
Kie?	Ŭapi?
Kiam?	Lini?
Kio?	Nini?
Kial?	Kŭa nini?
Kiu persono?	Nani?
Kiu objekto?	Gani?

Laste aperigitaj de Vinilkosmo

muziko • Alena ADLER

La Mondanoj – La junularo de hodiaŭ

La berlina esperanto-rokbando de la 80-aj jaroj *La Mondanoj* post 36-jara paŭzo reaktiviĝas, komence per nova muzikvideo [La junularo de hodiaŭ](https://www.youtube.com/watch?v=S1Ly-m6GUMk) <youtube.com/watch?v=S1Ly-m6GUMk>, kiu aperis la 3-an de Januaro 2024. Ili laste koncertis en Krakovo kadre de la centjara jubileo de Esperanto. Tri el la



kvar originaj membroj de la grupo bonvenigas novan drumiston al la bando.

- **Aaron KOENIG:** ĉefkanto kaj ritmogitaro
- **Carsten KINDERMANN:** basgitaro kaj korusoj
- **Tom WUNDERLICH:** ĉefgitaro kaj korusoj
- **Niklas NEUMANN:** drumo

Jonny M – Jonny M Petolas

Nova albumo de la germana regea-repa artisto Jonny M, [Jonny M Petolas](https://www.tinyurl.com/jonnympetolas) <tinyurl.com/jonnympetolas> aperis la 5-an de

Januaro 2024.

Ekde 2006 Jonny M laŭproverbe “staris, ekfaris”, pri muziko en Esperantujo. Malofte ni vidas artistojn, kiuj pretas sin premi al faroj preter tio, kion ili jam pruvis al si. Jonny M daŭre sin pelas antaŭen en sia hejma produktejo (kun saĝaj paŭzoj por

ripozi kaj retrovi kreemon), kaj rezulte ni aŭdas nun denove la plej freŝajn repon kaj regeon de li. Liaj fanatikuloj kalkulas je li por tia muziko, ke ĝi dancigas en la diskejo, kaj lia nova albumo ne seniluziigas. Plej grave, liaj kantoj komprenigas la esperantan kulturon per ĝoja kaj orelverma muziko.



JeLe – Stacioj de l'amo

De la amata duopo *JeLe*, patrino kaj filino, aperis la 13-an de Februaro 2024 kvina Esperanto-albumo, nome [Stacioj de l'amo](https://www.tinyurl.com/staciojdelamo) <tinyurl.com/staciojdelamo>. Leĝeraj soprano kaj



kontralta voĉoj, lertaj komponoj, kaj brilaj kantotekstoj regas la aŭskultanton. La muzikon kaj tekstojn kreis Elena (Lena) WILKE, krom por *Kiam mi rigardis vin*, kies tekston verkis Marina KOROTJ.

La komponoj trafas la orelon kaj koron per sia taŭgeco al la mesaĝo de la kantoj, de

hantaj al spritaj ĝis saŭdadaj. La kantotekstoj estas bela miksaĵo de kulture esperantaj kantoj kaj kantoj pri temoj tutmonde senteblaj. La titoloj *Patrino* kaj *Atendas* estas plorige honestaj alrigardoj al roloj kaj al sekvoj en familia vivo. *Nun liberas mi*, kvankam temo ofte traktita kun muzika pezeco, male dancigas, kun muzika “debato” inter la malalta voĉo de la violonĉelo kaj la altaj tonoj de la gitaro. Certe jen tre bela kaj aŭskultinda albumo de la paro.

TIM – Bela vivo

Mi laste vidis la talentan TIM en Storkow kiam li koncertis por la Junulara E-Semajno (JES). Li estis juna muzikisto kun grandegaj sperto kaj lerto jam antaŭ tiam, kiam li eltrovis esperanton. Nun li aperigas tutnovan bit-albumeton [Bela vivo](https://www.tinyurl.com/timbelavivo) <tinyurl.com/timbelavivo>, la 8-an de Marto, 2024.

Sume enestas ses titoloj, ĉiuj originalaj muzikaj verkoj. Aŭdiĝas originalaj tekstoj de TIM kaj Liven Dek, kaj fine aŭskultinda



kroma instrumenta versio de la dua titolo. La trakoj transportas la aŭskultanton per elektronikaj kaj rokaj elementoj. Mi antaŭvidas ĝuindan ludigadon de la unuaj titoloj en diskejo sed same dum laboro aŭ fizika trejniĝo. Al la kvina titolo mankas la same bona

ekvilibro inter la voĉo kaj la instrumentoj, kiu troviĝas en la kvar unuaj kantoj. La albumo estas elstare havinda, kun brilaj muziko kaj teksto en ĉiu titolo.

Oficiala muzikvideo de la unua titolo [Pluvo kaj Vivo](https://www.youtube.com/watch?v=wFYz-_NF5IQ) <youtube.com/watch?v=wFYz-_NF5IQ> aperis la 20-an de Marto.

The Language Corner with Lee Miller

About “el” and “de”

English speakers sometimes experience challenges deciding when to use “el” and “de”, because both can often be translated with the word “of”. Here are some example sentences to illustrate the usage of “el” and “de”, and to show some of the distinctions between them.

“El” always carries the fundamental meaning of “out of” or “from within”. For example:

La infano venis el la necesejo = The child came out of the bathroom

Larmoj falas el miaj okuloj = Tears are falling from (out of) my eyes

Pano estas farita el faruno kaj gisto = Bread is made from (out of) flour and yeast

La rakonto estas el la fabeloj de Andersen = The story is from Andersen’s fairy tales

El miaj amikoj, ŝi estas la plej lerta = Out of my friends, she’s the most clever

Mi ĵus vekigis el dormo = I just woke up from (out of) sleep

La kafo estas el Gvatemalo = The coffee is from Guatemala

Mi preferas kuirilojn el ŝtalo = I prefer steel cooking implements

Mia patro kuris el la domo = My father ran out of the house

“De” has a wide range of meanings in Esperanto. Don’t try to understand it too narrowly. For example:

Mi vojaĝis de Parizo al Amsterdamo = I traveled from Paris to Amsterdam

Mi laboras de mateno ĝis vespero = I work from morning to evening

La libro estas plena de eraroj = The book is full of mistakes

Mia tablo estas kovrita de paperoj = My table is covered with/by papers

La libro de Mateo estas tre stranga = Matthew’s book is very strange

Ĝi estas libro de misteroj = It’s a book of mysteries

Mi manĝis duonon de la kuko = I ate half (of) the cake

Mi estas la aŭtoro de la libro = I am the author of the book

Mi laboras pri pretigo de nova eldono = I’m working on a new edition



Lee MILLER

Liĉjo is a member of the Akademio de Esperanto, is an expert Esperanto instructor, and has been the main administrator of the Duolingo Esperanto Learners Facebook group since its inception in 2015. This article is adapted from one of his popular language lessons posted in that group.

<licxjo@gmail.com>

Sceno 1, TAKE 10 en Fortalezo

kongresaj raportoj • Alekso MILLER



Dum la 10-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto en Brazilo, kelkaj reĝisoroj de La Usona Bona Film-Festivalo renkontiĝis kaj babilis pri la kino. Bela avantaĝo de film-festivalo estas, ke oni povas “antaŭrenkonti” amikojn en la movado simple per speкто de iliaj filmoj. François LO JACOMO kaj Ingrid OLIVEIRA fotiĝis kun Alekso MILLER kaj Brandono SOWERS ĉe la kongresejo, kaj vi povas ĝui iliajn filmojn [La diversaj gradoj de spriteco](#)¹ kaj [Konkreta ĝangalo, planta ĝangalo](#)² en la Jutub-kanalo EsperantoUSA.

Ĉe TAKE, Alekso faris prezenton pri la Usona Bona Film-Festivalo. Anstataŭ prepari prelegon kun bildoj kaj faktoj pri la festivalo, li decidis krei filmon kiel pruvado, ke oni povas facile kunlabori kaj krei filmojn sen multa planado kaj ekzercado dum kongresoj. Severija Marija BANAITYTĖ el Litovio, kiu ĵus ĉefrolis en la dua muzikalo de TEJO [Petveturaj Aventuroj](#)³, kaj Sarah Pereira MONTEIRO el Brazilo, kiu aktoris en la filmo [Gerda Malaperis](#)⁴, konsentis aperi en la skeĉo, kiun Brandono kaj Alekso filmis.

La tutan aferon ili registris kaj muntis dum nur unu horo tuj post la kongresa grupfotiĝo. Ilia filmo [Io Problema](#)⁵, kiu troviĝas en la Jutub-kanalo “Exploring Esperanto”, temas pri problemoj kaj ŝercoj rilate la lando-finaĵojn *-ujo* kaj *-io* en Esperanto. Kongresano Ikvero ALMEJDO, kiu silente observis en la akceptejo dum la filmado, poste komentis, “*Vidi tion okazi en reala tempo estis la plej alta punkto de tiu kongreso.*”

1. [La diversaj gradoj de spriteco](#)
<youtube.com/watch?v=73BZtUmF78A>
2. [Konkreta ĝangalo, planta ĝangalo](#)
<youtube.com/watch?v=-bvrT5YJuSA>
3. [Petveturaj Aventuroj](#)
<youtube.com/watch?v=kFK5C2khdug>
4. [Gerda Malaperis](#)
<youtube.com/watch?v=CdnSunTkzkk>
5. [Io Problema](#)
<youtube.com/watch?v=a_s5Yl0UX_0>

Alekso MILLER



Alekso estas la estro de la jutuba kanalo *Exploring Esperanto*. Li servis kiel vicprezidanto de E-USA kaj fondis La Usonan Bonan Film-Festivalon dum sia mandato. Li loĝas en Atlanto, la ĉefurbo de Georgio en Usono kaj gastigas samideanojn per la Pasporta Servo. Lasu komenton en lia kanalo por kontakti lin.

Stuff You Should Know

media hits • Rama MARVIN



La fama anglalingva podkasto “*Stuff You Should Know*” lastatempe lanĉis epizodon pri Esperanto.¹ Ĉi tiu okazaĵo estas grava paŝo por Esperanto, ĉar ĝi prezentas la lingvon al pli vasta publiko, inkluzive de homoj, kiuj eble antaŭe ne konis la internacian lingvon.

Stuff You Should Know estas unu el la plej popularaj podkastoĵoj en la mondo; ĝiaj epizodoj atingas milionojn da aŭskultantoj. Ĝi esploras diversajn temojn pri scienco, historio, strangaj faktoj kaj kulturaj fenomenoj. La prezentantoj, Josh kaj Chuck, donas informojn en maniero facile komprenebla kaj amuza.

En ĉi tiu epizodo, la podkastistoj esploras la originon de Esperanto kaj la vivon de ĝia kreinto, Ludoviko ZAMENHOF. Ili prezentas, kial homoj elektas lerni la lingvon, kaj kiel ĝi evoluis tra la jaroj. Krome ili priskribas, kiel Esperanto estas uzata hodiaŭ, kaj kiel ĝi povas servi kiel rimedo por komunikado inter homoj el diversaj kulturoj kaj lingvaj grupoj.

La elsendo de ĉi tiu podkasto prezentas novan ŝancon, por ke Esperanto estu konata de pli larĝa spektro de homoj nun. Estas klaraj signoj, ke intereso pri Esperanto kreskas, kaj estas kialo por esperantistoj ĉie ĝoji. *Stuff You Should Know* sukcese prezentis Esperanton al sia vasta aŭskultantaro. Laŭ la opinio de ĉi tiu aŭtoro, ili faris bone; mi esperas, ke pli da homoj ekscios pri nia bela lingvo.

1. [Esperanto: Tre Mojosa](https://www.tinyurl.com/SYSK-E0)

<[tinyurl.com/SYSK-E0](https://www.tinyurl.com/SYSK-E0)>

X is for Xenomaniacs (and Esperantists)


libroj • Ellen EDDY

Nia estimata kontribuanto Ellen Eddy sendis al ni informojn pri mencio de Esperanto en nova libro de Sarah Ogilvie kun proponita flanklegaĵo el la arĥivo de E-USA pri interesa historia figuro. Ankaŭ mi rekomendas la artikolon pri Henry Phillips Jr, leginte ĝin, mi lernis diversajn novajn aferojn!

–Alena Adler

There’s a new book by Sarah Ogilvie named “[The Dictionary People: The unsung heroes who created the Oxford English Dictionary](#)”.¹ If you are familiar with the OED, you may know that it was a massive endeavor that started in 1857 and finished in 1928. Years ago, I had read Simon Winchester’s book *The Professor and the Madman*, about one of the contributors to the OED, so I was intrigued to learn more. I downloaded the

story on my iPhone and started listening. The author breaks down the contributors to each letter of the alphabet. What a surprise when it came to the letter X. It not only mentions Esperanto, but gives a short history of invented languages, especially Volapuk and Esperanto. Even more surprising, she mentions Henry Phillips, who is considered the first American who championed Esperanto in the United States. I found an



article written by Bernard Golden in an ELNA newsletter publication – Zamenhof supplement 1980 – titled “[Henry Phillips Jr, \(1938-1895\): La unua esperantisto en Ameriko](#)”.² Ogilvie’s whole section on Esperanto is very positive, so I don’t mind being a Xenomaniac!

–Ellen Eddy

1. “[The Dictionary People: The unsung heroes who created the Oxford English Dictionary](#)”

<[tinyurl.com/thedictionarypeople](https://www.tinyurl.com/thedictionarypeople)>

2. “[Henry Phillips Jr, \(1938-1895\): La unua esperantisto en Ameriko](#)”

<bulteno.esperanto-usa.org/a/1980/08/51-phillips/>

Batalo por Tero aŭ vetkuro al la steloj


ludoj • Joshua HOLZER

Bone aŭ malbone, Esperanto estas foje karakterizita kiel “la lingvo de paco”.¹ Sed kial la angla, la araba, la ĉina, la franca, la hispana, kaj la rusa estas la oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj? Ne estas ĉar ili estas lingvoj de paco. Estas ĉar ili estas


lingvoj de milito! Precipe, estas ĉar landoj, kiuj parolas tiujn lingvojn, estis sur la venka flanko de la dua mondmilito. Ĉu vi iam demandis, ĉu Esperanto ricevas pli da rekono se ĝi uzus militon – anstataŭ pacon – por solidigi sian lokon ĉe la monda scenejo? Kun *Freeciv*, vi povas eltrovi!



Freeciv <freeciv.org> estas senpaga imperio-konstrua strategioludo surbaze de la populara ludserio *Civilization*. Ĝi estas havebla por vindaĵoj kaj makintoŝaj komputiloj, kaj ĝi povas esti ludita en diversaj lingvoj – inkluzive de Esperanto!



Pasintece, mi ĝuis multajn el la ludoj *Civilization*. Do lastatempe, mi decidis provi *Freeciv*. En la originalaj ludoj, oni ludas kiel historia popolo, kiel la grekoj, la romianoj ktp. En *Freeciv*, min surprizis ekscii, ke oni povas elekti inter multaj modernaj civilizacioj, sed ankaŭ inter pluraj fikciaj, inkluzive de la “Esperanta”! Post nelonge, mi Esperantujojn fondis, kaj ĝi baldaŭ fariĝis potenca militoforto. La fina venko neniam estis tiel proksima!



Tute serioze, *Freeciv* – kiel Esperanto – estas malfermita komunuma projekto. La ludo ne estas plene tradukita, sed espereble iam estos. Ludi *Freeciv* povas esti amuze, sed mi imagas, ke ankaŭ kontribui tradukkapablojn al la *Freeciv*-projekto povas esti amuze.

Cetere, oni ne devas uzi militon por venki en la ludo. *Freeciv* permesas ankaŭ sciencan venkon. Kiu ajn konstruas kosmoŝipon por atingi la sistemon Alfa Centaŭro, tiu venkas! Kial kontentiĝi kiel “la internacia lingvo”, kiam Esperanto povus esti la lingvo de la galaksio!

1. “La lingvo de paco”
<bulteno.esperanto-usa.org/a/2022/04/leterkesto/holzer/>

Joshua HOLZER

Joshua estas asistanta profesoro ĉe Westminster College (en Fultono, Misurio) kie li instruas politikan sciencan.

<josh.holzer@westminster-mo.edu>



A Letter from Alabama

korespondi deziras

How long had the letter been on the desk at UEA's U.N. office at 777 UN Plaza in New York City? Who was it from? Why send something to an office that is infrequently visited? I suspect these were some of the questions running through Humphrey Tonkin's mind when he discovered a letter with an Alabama return address when he visited the office in late 2023.

The handwritten letter was from Shannon Barlow who, with two others, had started studying Esperanto. Somehow, they found the 777 address and sent the letter. So why write instead of using the Internet to find out about Esperanto? Well, Shannon, Ryan and Michael don't have access to the Internet. They are prisoners at the Bibb County Correctional Facility in Brent, Alabama. Humphrey sent the letter to me, and I responded; anyone resourceful enough to write to the 777 address deserved an answer!

Here are their Esperanto stories.

Shannon, Ryan and Michael would like to correspond with the readers of *Usona Esperantisto*. You can do so by snail mail (address is found after each of their messages). You can also [write to them electronically online](#) <securustech.online/#/login> (it costs \$0.15 to send a message)!

—Chuck Mays



From Shannon Barlow

Saluton!

My name is Shannon Barlow and I am a 46-year-old guy who has been in prison since I was 15. I first came across the word Esperanto in an old dictionary. I then looked it up on my tablet and found a book written by Helen Fryer, titled *The Esperanto Teacher: A simple course for the non-grammarian*. Then, to my luck I found an address to the Universal Esperanto Association located in New York, so I wrote a short letter, and received a reply from Chuck Mays.

During this time, I also introduced several guys to the language, explaining to them the vision of Dr. Zamenhof. “Espero” is what really sold us on his world views. With help from Chuck, who sent us an updated book and dictionary and got us started on the free postal course, we are progressing. Thanks to E-USA president Brandon Sowers, we are now enrolled as members of Esperanto-USA. I'm really interested in learning Esperanto for a new start, to meet new people who share the same views of a better world as expressed in the song “La Espero” by Dr. Zamenhof. When I found this gem of a language it was so beautiful that I had to share it with others, and so I did and am, and will continue to do so. Thank all of you all so much.

Your fellow Esperantist and friend Shannon.

Shannon Barlow #183626
Bibb County Correctional Facility D1-212
565 Bibb Lane
Brent, Alabama 35034

Editorial Note: [The Esperanto Teacher: A Simple Course for Non-Grammarians](#) <gutenberg.org/ebooks/8177> was published in 1907 and as a grammar textbook is very different from the interactive methods available online today. *The Esperanto Teacher's* method still holds up, as it teaches the student to begin thinking directly in Esperanto as soon as possible, without mental translation. That said, it may be a sort of “time capsule” of Zamenhof-era learning material. It's considerate to use model, *fundamenta* Esperanto when writing to learners. Also consider indicating your own level of fluency.

From Ryan Brocato

Saluton!

Mi nomiĝas Rajano!

I am super excited about the Esperantist culture and identity that I am growing into. I believe in the idea of world citizenry. Aren't we all citizens of this Earth we call home? I came across Esperanto through my best friend Shannon. I have dabbled with a few languages like Japanese, Italian, Hebrew, and Spanish mainly because I was looking for a cultural identity that I could never find. I reconnected with my best friend, and he was learning this language of hope. As a free thinker, I delved into the liberation of hope with the e-books that my prison tablet offers. I started with a Helen Fryer book on Esperanto and within a week we had a very good vocabulary built and I was excited. I am now doing the postal Esperanto course, and as I read more about Dr. Zamenhof, I realize he had a vision for all of humanity: Hope. All the divisions that are placed upon so many people that cause strife amongst the world population, are easily dissolved in the unified language of hope. Please feel free to contact me, I would love to engage with my Esperanto family more and more. As we grow together without barriers, we will gain much more insight into the essence of humanity. Hope Without Borders.

Ryan Brocato #250800
Bibb County Correctional Facility D3-1b
565 Bibb Lane
Brent, Alabama 35034

From Michael Cody

My name is Michael and I was introduced to Esperanto by a friend, Shannon Barlow. We began studying the language from our tablets through e-books. We researched the history of this language to see its significance to the world soon to realize that it was created to bridge the gap between cultures, nations, and to bring the world altogether. Having a language to eliminate language barriers and eliminate interpreters was a genuine idea. I can see how this language can help unify people from all walks of life and sincerely create cells of like-minded people to possibly change the world. Seeing things through empathy and compassion without barriers is ideal for what the world is becoming, because of its accelerated technology and international scope of issues requiring all minds to work together in harmony to conquer the depravities of our world. I truly believe that this can be done through the art of communication. The future depends on all positive possibilities and what better way to start than by simply bringing people together.

Michael Cody #221789
Bibb County Correctional Facility D4-18a
565 Bibb Lane
Brent, Alabama 35034

Mikronoveloj

Por nia mikronovelo-rubriko ni petas rakontojn de precize 100 vortoj – nek pli, nek malpli. Sendu viajn centvortaĵojn al la redakcio (trovu la adreson en la kolofono), kaj eble ili aperos en venonta numero!

Diantoj

Ekde la knabinaĝo Maria revis fariĝi bazlerneja instruistino, sed ŝia unua instruista jaro ŝajnas fiaskinta ĝis nun.

“Vi balbu... buta... butas!”

“Vi plumpas!”


“Vi malaltas!”

La infanoj mokadis ŝin pro ŝiaj trajtoj. Seniluziiĝinte ŝi fojfoje konsideris rezigni la instruadon.


Hodiaŭ estas la Tago de Instruistoj. Kutime la ĉeflernanto tributas bukedon da diantoj al la instruisto nome de la tuta klaso. Ĉu Maria povus ricevi bukedon de siaj tridek gelernantoj?

Veninte antaŭ la klasĉambro, ŝi apenaŭ povis kredi siajn okulojn. La pordo estis bele dekoraciita per tridek unuopaj ruĝaj diantoj! Enirante, Maria aŭdis la infanojn klami aplaŭdante, “Koran dankon, Instruistino Maria!”

– *CHO Sung Ho*



Panegiro



La blogo hazarde trafis miajn okulojn. Preskaŭ ĉiutage ŝi rakontis sian kontraŭkanceran bataladon, surprize aplombe. Turmentis ŝin senfinaj intravejnaj injektoj, haŭtmortiga radioterapio, komputita tomografio kaj aliaj monstraj maŝinoj. Antaŭ ĉio ŝi penis teni neŝanceliĝeman menson kun rokfirma koro. Kvankam ateisma, ŝi preĝadis al Dio kaj Budho. For la demonaj kancerĉeloj!

Ĉar mi suferis la samon antaŭ nelonge, mi kun simpatiego sekvis ŝiajn afiŝojn dekomence kaj atendis, ke ŝi trapasu ĉiujn kuracetapojn, kiuj daŭros ses monatojn. Mi panegiris al ŝi per kuraĝigo kaj aplaŭdo.

Kiam tri longaj monatoj pasis, nenio afiŝiĝis plu en ŝia blogo. Larmoj ne ĉesis vuali la ekranon.

– *Cho Sung Ho*

La fina enketo



La alta, fortika detektivo frostotremis en la malvarmo de la ombra, putra domo; la flagranta poŝlampo estis lia sola lumfonto. Li vane serĉis, paŝante el ĉambro al ĉambro ĝis, finfine, li trovis ion kaŝitan en polvkovrita tirkesto – foton, kiu ŝokis lin profunde. Ĝi montris la sangan krimon! Li ekĝemis,

poste ridetis. Finfine li fermas la enketon! Li prenis sian poŝtelefonon, sed antaŭ ol li povis voki, li aŭdis paŝojn malantaŭ si. Li provis turniĝi sed sentis la malvarman ŝtalon de ies pafilo ĉe sia dorso.

“Via tempo jam finiĝas, Sinjoro Detektivo,” mokis voĉo basprofunde. “Mi atendis vin.”

Pafo eksonis.


– *Izako ZAVIRUĤA*

La koŝmaro



Ŝi ruliĝas fermokule kaj konstatas pro la deklivo de la matraco, ke ŝia edzo ankoraŭ restas surlite. Komence lia tieo konfuzas ŝin, sed dum ŝi aŭskultas lian spiradon, la detaloj de ŝia terura sonĝo tralikiĝas en ŝian vekigantan konscion. Ŝi sonĝis, ke ŝi murdis lin, tamen tre nesperte. Ŝi provis veneni lin per kaŭstikaj purigiloj sed sukcesis nur malsanigi lin. Poste ŝi devis turni sin al pli deproksimaj metodoj – ŝnuro ĉirkaŭ la gorĝo, sako ĉirkaŭ la kapo, martelo, nu, ĉie. Malfermante la okulojn, ŝi rigardas lin, kaj bedaŭro banas ŝin. Kia koŝmaro! Nun ŝi devos fari la tuton denove, realvive.

– *Debra HAMEL*



Debra estas verkisto de pluraj libroj pri antikva Grekujo (en la angla). Ŝi esperas daŭre plibonigi sian scipovon de Esperanto kaj verki pli en la lingvo. Ŝi loĝas en Konektikuto, Usono.

<hamel.debra@gmail.com>



La kosmonaŭto

Ŝi revis pri aliaj mondoj preskaŭ tiel longe, kiel ŝi parolis Esperanton. Ŝi aspiris esti pioniro de sia specio: la unua homo saluti Marson en Esperanto.

Ŝi sidis sur seĝo en la kosmopramo, inter aparatoj kaj kabloj. Jam komenciĝis la retrokalkulo. Ŝi sentis la rapidan batadon de la koro. Kvar ... tri ... du ... unu ... “Adiaŭ, Tero. Mi revenos kun rakontoj pri la ruĝa planedo.”

Ek! Ŝi forflugis de la tero per bruo kaj fajro, kaj eniris en la silentan kosmon. Kaj jen la planedo: nova mondo, jam brila ruĝa lumpunkto antaŭ ŝi. Ridetante, ŝi flustris, “Saluton, Marso. Mi estas via amiko.”

– *Izako ZAVIRUĤA*

Kolofono

Usona Esperantisto estas la oficiala bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Artikoloj estu proksimume 500–1500 vortojn longaj. Prefere sendu materialojn retpoŝte kun viaj nomo, adreso kaj memfoto. Kun aliaj fotoj bonvolu sendi informon pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte ricevatajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Opinioj esprimataj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas vidpunktojn de la redaktoro aŭ Esperanto-USA.

Sendu kontribuojn al bulteno@esperanto-usa.org.



La forkaptado

Sub estingiĝantaj steloj, Jakobo staris meze de la maizkampoj. La frumatena vento sentiĝis malvarmeta kontraŭ lia haŭto. Li rigardis supren, dum la lasta lumo de foriranta NIFO malaperis en la tagiĝan ĉielon, kaj komencis marŝi reen al la farmdomo.

Hejme, Jakobo senprokaste duŝis sin, kaj la varma akvo forviŝis ĉiujn spurojn de lia ekstertera renkonto. Okazinte tiel ofte, la afero preskaŭ rutiniĝis.

Sekiginte sin, li prenis karton de la litotablo. “Post kvin sondadoj, sesa senpaga!” ĝi anoncis diklitere.

Rideto montriĝis sur lia vizaĝo, kaj Jakobo faris kvinan markon. Eĉ sen lojaleca karto, la afero estis malpli kosta ol sanasekura kotizo.

– *Timothy BORONCZYK*

Materialoj aperintaj en *Usona Esperantisto* estas libere haveblaj kaj redisdoneblaj laŭ la permesilo CC BY-SA 4.0. Ni tamen petas, ke legantoj atendu du monatojn antaŭ ol reeldoni la plej freŝajn artikolojn.

La limdato por artikoloj en № 2024:2 estas **22 Aprilo**. Sendante materialon al la redakcio, oni donas al Esperanto-USA neekskluzivan permeson redakti kaj aperigi la materialon en la bulteno kaj en aliaj eldonaĵoj. Aŭtoroj tamen retenas kopirajton kaj tial rajtas reuzi, reeldoni, aŭ vendi siajn originalajn, neredaktitajn verkojn laŭplaĉe, sen bezono atribui ilin al *Usona Esperantisto*.

Redakcia teamo: Alena ADLER kaj Logan HALL.

Renovigu vian membrecon tuj!

